


Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

101-a jaro • n-ro 1212 (3) • **Marto 2008**



Claude Piron ne plu inter ni

**Bona Espero
en la brazila savano**

**La nederlanda
socio**

**Libroservo de UEA
en 2007**



Vi trovas...

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788

✉ revuo.esperanto@gmail.com;
revuo@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ uea@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 51 ... Malferme: Li feliĉigis kaj plisaĝigis nin (Humphrey Tonkin).
52 ... Adiaŭe (Barbara Pietrzak). Li estis por mi la plej samopinianta amiko (Renato Corsetti).
53 ... Memore kaj danke (Baldur Ragnarsson). Claude Piron, i.a. poeto (Jorge Camacho).
54 ... Li plu vivos en sia verkaro (Detlev Blanke). Claude Piron kaj *Vojaĝo en Esperanto-lando* (Boris Kolker).
55... Nur lia koro ne plu batas (Hans Bakker).
56 ... Ĉu funebro aŭ cerebro? (Claude Nourmont). Mesaĝo de la Prezidanto al la funebra ceremonio (Probal Dasgupta).
57 ... Claude Piron ne plu inter ni. Ĉu li forpasis tro frue? (Amri Wandel).
58 ... 93-a Universala Kongreso: *Lingvoj: trezoro de la homaro*. Alvoko kunlabori pri la Kongresa Temo (A. Giridhar Rao). Kleriga Tago.
59 ... Kalendaro 2008-2009.
63 ... La ĉi-jara kongreslando: La nederlanda socio: malnovaj kaj novaj dividiĝoj (Ziko van Dijk).
65 ... Laste aperis.
66 ... Malferma Tago. Libroservo de UEA en 2007: La sesa ĉampioneco de Boris Kolker (Osmo Buller).
67 ... Oficiala informilo.
68 ... En la brazila savano: Bona Espero por infanoj (Wera kaj Detlev Blanke).
69 ... KEA kaj UEA: Jubilea Simpozio en Havano (Maritza Gutiérrez Gonzáles).
70 ... Buller esploris pri UK en Kubo. Esperanto en Unesko-retejo. Ĉirkaŭ 1200 aliĝis al Roterdamo. Biblia Studkurso. La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK).

KOVRILPAGE: La 22-an de januaro 2008 forpasis nia ĉefa nuntempa pensulo, populara Esperanta verkisto kaj poeto, oratoro, pedagogo, Honora Membro de UEA, Claude Piron (legu pli sur la p. 51-57).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado):
Prof. Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359 7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): D-ro inĝ. Ranieri Clerici, Via Conte Verde 66, IT-00185 Roma, Italio; ☎ +39 333 255 19 04, ☎ +39 06 97 600 326; ✉ ranieri.clerici@tin.it.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado):
S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h], ☎ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.


Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20; ✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524; ✉ horizonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of], ☎ +56 994521017; ✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.



Li feliĉigis kaj plisaĝigis nin

La forpaso de Claude Piron forprenis de ni nian ĉefan nuntempan pensulon. Liaj verkoj kaj prelegoj celis penetri sub la surfacon de la vivo de nia komunumo por pli bone kompreni la karakteron ne nur de Esperanto sed ankaŭ de la homoj, kiuj parolas Esperanton – kaj precipe de la homoj, kiuj ĝin ne parolas. Kial la rezisto al Esperanto? Kial la insista miskompreno, aŭ nekompreno, de tio kion la esperantistoj faras, kaj de la problemoj kiun ili celas solvi? Iuj homoj trovas ĝin en la politiko – la fakto, ke Esperanto riskas reordigi la potencorilatojn en la socio. Iuj trovas ĝin en la ekonomio – la fakto, ke la nuna ekonomia ordo favoras iujn landojn kaj lingvojn kompare kun aliaj. Claude Piron ne ignoris tiujn aferojn, fakte li eĉ skribis pri ili, sed lia unika kontribuo estis rigardi sub la haŭto de la homoj kaj trovi pli profundajn timojn kaj fobiojn, kiuj pelis ilin malakcepti tion, kion ni nomas la internacilingva ideo. Li nomis tiun reziston patologio.

Li venis al tiuj konsideroj nur malrapide, kaj kun la ĉasista instinkto de lerta psikologo. Kio estas la lingva konscio, kaj kie ĝi situas inter la profundaj valoroj de la homoj? La procedo komenciĝis ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kie li laboris kiel tradukisto, kaj poste ĉe la Monda Organizaĵo pri Sano en Ĝenevo. Kiel tradukisto, lia tasko, evidente, estis transmeti la signifon de unu lingvo en alian.

Li komprenis el propra sperto, ne nur kiel malfacila estas tiu tasko, sed ankaŭ kiel malsame la lingvoj de la mondo procedas por transdoni signifon. Nur malgranda plua paŝo portis tiun ĉi rimarkindan poligloton al la konstato, ke tiu Esperanto, kiu ŝajnas simili la lingvojn de Eŭropo, havas karakterizojn, kiuj igas ĝin signife malsimila. Je la surfaca nivelo de la vortprovizo, memevidente Esperanto similas la lingvojn, kiujn Zamenhof konis, sed se oni rigardas sub tiu surfaco, al la sistemo de vortkunmeto kaj al la sintakso, la lingvo montras alian vizaĝon. Piron instruis al ni, ke ĝi estas lingvo rimarkinde adaptebla al la pensoformoj de multaj kulturoj kaj en tiu senco familiara al ĉiuj popoloj. Jen unu aspekto de la genio de Zamenhof.

Li estis profunda kaj profunde raciisto. Ĉar la lingvo Esperanto ekzistas, indas, ke ni uzu ĝin kiel eble plej efike, precipe emfazante ĝian simplecon kaj ĝian alireblon. Li estis malfavoranto de abundaj neologismoj kaj malamanto de tiuj (literaturistoj, Akademianoj, kompilantoj de vortaroj) kiuj igis la lingvon pli komplika ol ĝi povus esti. Li montris, ke per uzo de kombinoj de bazaj radikoj oni povas preskaŭ ĉion esprimi – kaj tion li instruis al siaj lernantoj en Esperanto-kursoj kaj

al la legantoj de liaj libroj. Kvazaŭ por pruvi sian hipotezon, sed ankaŭ ĉar lin amuzis kaj fascinis la solvado de problemoj, li verkis sub la pseŭdonimo Johán Valano lertajn detektivajn romanojn, verkitajn en stilo klara kaj facile legebla. La titoloj ĉiam komenciĝis per la vorto „ĉu“ – vorto karakteriza de la aŭtoro, kiu, kun la insistado de homo kiu frandis la pensadon, daŭre volis kompreni kiel mekanismoj funkcias, kiel la radoj turniĝas.

Lastatempe li okupiĝis pri kreo de serio de franclingvaj retaj filmetoj pri aspektoj de Esperanto kaj lingvoj, prezentata kun

lia kutima kombino de bona humoro, sprito kaj insista informiteco. Rigardante ilin nun, mi malfacile povas kredi, ke tiu bona homo, kiu parolis kaj klarigis nian bonan lingvon, ne plu laboras tie en sia hejmo en Ĝenevo kiel apologianto kaj pledanto por nia lingvo. Iasence taŭgis, ke ĝuste en Ĝenevo li laboras – ne nur pro tio, ke tiu urbo estas simbolo de la paca kunlaboro de la nacioj, sed ankaŭ ĉar tie antaŭ cent jaroj Ferdinand de Saussure ellaboris sian teorion pri strukturismo, kiu lanĉis la modernan lingvistikon. Piron, pli klare ol ĉiuj aliaj, montris kiel Zamenhof anticipis la eltrovojn de Saussure kiam li kreis Esperanton.

Mi ne plu memoras kiam mi unue renkontis Claude Piron. Fakte, mi havas la impreson, ke li ĉiam tie estis. Mi vizitis lian hejmon en Svislando kaj li la mian en Usono. Kiam en 1974 mi fariĝis prezidanto de UEA, mi plurfoje klopodis persvadi lin preni sur sin iun formalan rolon en UEA, kiel estrarano aŭ komisiito. Sed li ĉiam rezistis tiun rolon, argumentante, eble prave, ke li estas karaktere netaŭga por tiu laboro (li ne ĉiam kaŝis sian koleron antaŭ stulteco, nek sian obstinon kiam li konsideris sin prava), kaj ke ĉiuokaze li povas esti multe pli utila se ni lasas lin kiel ian liberan spiriton de la movado. Li ne serĉis atenton, malamis popolamasojn, preferis voji sian vojon. Sed, tiuj, kiuj sukcesis persvadi lin prezenti kurson pri iu aspekto de Esperanto, fari paroladon ĉe iu kongreso, aŭ simple pasigi vesperon en intensa konversacio, ja ne povis, nek devus, rezisti la klarecon de lia menso kaj la insiston de liaj argumentoj. Dume, li ankaŭ verkis kaj kantis kanzonojn kaj eĉ talente verkis poemojn.

La talento de klareco igis liajn nacilingvajn verkojn nerezisteblaj ankaŭ por eksterstarantaj fakuloj. Tiuj verkoj ŝanĝis la opiniojn de multe pli ol unu lingvisto pri la valoro de Esperanto, kaj kun la paŝo de la jaroj li zorgis akriĝis siajn argumentojn. Al multaj pledantoj por Esperanto mankas la



faka scio por senerare aliri fakulojn, sed Piron kombinis firman scion pri lingvistiko kun rifuzo sklave akcepti la konvenciajn normojn de tiu fako, kaj tiel malfermis la okulojn de tiuj, kiuj pretis aŭskulti lin.

Aŭskulti lin ja ne estis malfacile. Liaj ĉarmo, modesto kaj flama inteligento igis lin perfekta kamarado. Lia edzino Nicole kvazaŭ respegulis tiujn kvalitojn. Eble ŝiaj kubutoj estis iomete malpli akraj kaj ŝia aliro al la mondo iomete pli ĉirkaŭa, sed en tiu senco ŝi estis perfekta vivakompananto de tiu homo, bridante lin kiam necese kaj laŭeble indulgante lian emon jubile sekvi ĉiun intelektan spuron al ties logika konkludo. Al ŝi mi diras ne nur mian kondolencon sed ankaŭ la dankon de ni ĉiuj, ke ŝi helpis gvidi tiun eksterordinaran talenton laŭ tiel produktivaj kanaloj. Li feliĉigis kaj plisaĝigis nin ĉiujn.

Humphrey Tonkin

Adiaŭe



Kiam en la plej lastaj horoj de la 23-a de januaro venis la fulmbata, ŝajne ankoraŭ ne plene konfirmita informo pri la forpaso de Claude Piron, miaj pensoj kuris al nia lasta septembra renkontiĝo dum la poznana „Arkones“, la lasta mallonga amika interparolo kun Claude kaj Nicole. Estis io eksterordinara en tiu fakto, ke eĉ se ni ne tre

ofte renkontiĝadis, nur okaze de diversaj kongresoj kaj E-aranĝoj, mi ĉiam ĝuis la impreson, ke la rerenkontiĝo okazas en reciproka ĝojetoso. Ne alie estis la lastan fojon, kvankam ĉi-foje mi tamen enzorge notis lian ioman lacon post la plurhora lekciado dum la interlingvistika kursaro en Poznana. Mi ne insistis do pri aparta intervjuo ĝojante pri tiuj kelkaj, persone pasigitaj minutoj, ŝovante la ideon pri denova antaŭmikrofona renkontiĝo por laŭvica fojo, ŝajne baldaŭ venonta. La tempo premis. Ja multaj venis por lia prelego pri la temo, kiel evidentiĝis, laste aparte lin fascinanta *Esperanto kaj afazio*. Ne povante peti pri aparta interparolo mi ĝojis pro lia konsento registri la prelegon. Kelkajn monatojn pli poste ni ankoraŭ interŝanĝis ideojn pri ĝia prezento en la programo de Pola Radio kaj pri la disponigo de la sonmaterialo por lia hejmpaĝo. Mi ĝojis, ke tie jam troviĝas alia mia sondokumenta registraĵo de lia porokaza prelego *Kiaj perspektivoj post unu jarcento?*, speciale pretigita por la solenaĵo de la 100-jariĝo de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Mar.

Se tiuj prelegregistraĵoj estus iu ruĝa fadeneto mi devas menci la unuan – faritan, sed neniam publike aŭdigitan – dum la solenaĵo de la 100-jara jubileo de la unua esperantista grupo en Nurenbergo en la jaro 1988. Reference al la mutacireguloj

Claude Piron parolas en ĝi pri la latentaj potencialoj de la esperantlingva komunumo, kreskinta el la loka klubo en Nurenbergo al la monda komunumo, kvankam ĝenerale zorgiganta esperantistojn pro la fakto ne esti tiom vasta, kiom ili dezirus aŭ imagus. Ĝi aparte impresis min pro la trafeco de la argumentoj, referencantaj ne al la emocioj, sed al la scienco pri emocioj, do psikologio. Ĝi ne estis la unua, en kiu li uzis siajn profesiajn konojn por analizi la fenomenojn de la internacia komunikado, sed por mi persone unu el la plej inspiraj.

Dum tiu nurenberga jubileo okazis mia unua persona renkontiĝo kun Claude Piron, post kiu venis multaj aliaj, plej ofte en la ĉarma akompano de Nicole. Ĉiuj eksterordinaraj, ĉiuj riĉigaj, ĉiuj inspiraj, ĉiuj lasantaj la impreson, ke oni estas ŝatate renkontata, rerenkontata amiko. Kaj mi ne estis escepto. Nome Claude Piron havis, eĉ se oni ne konsciis tion, la karisman kapablon – en sia rilato kun aliaj – ligi individuan kontakton en la etoso de ĝia unikeco. La ĝenerala tristo kaj aflikto post lia forpaso atestas, ke tio ne koncernis sole individuojn, sed la tutan esperantlingvan komunumon.

Dankon, Claude, pro la bonŝanco renkonti vin, dankon pro la ideoheredaĵo, lasita al ni ĉiuj.

Barbara Pietrzak

Li estis por mi la plej samopinianta amiko

Kiam mi aŭdis pri la forpaso de Claude Piron mi povis nur pensi pri la unuaj versoj de la germana konata poemo: „Mi havis kamaradon/pli bonan vi ne trovos...“ Iom stulte. Mi agnoskas tion, sed tiuj versoj de poemo lernita en la meza lernejo en la lecionoj de la germana, abrupte revenis al mi kaj ne volis foriri.

Mi konis Claude persone de proksimume 30 jaroj. Mi memoras pri longaj diskutoj kun li pri tradukado de poemoj kaj kantoj dum la UK en Lucerno en 1979. Tiam ni estis ambaŭ junaj kaj ambaŭ ŝatis la malfacilan arton kunmeti rimon, ritmon, enhavon kaj normalan Esperanton. Ĉio sub tio ne estas tradukado de kantoj, ni teoriumis. Krome mi estis unu el la malmultaj legantoj kaj disvastigantoj de lia tiama verko *Kiel personeco sin strukturas*.

Mi memoras pri gastigo de li kaj Nicole, lia edzino, en Romo kelkajn jarojn poste.

Sed ĉefe mi memoras pri la pasiaj diskutoj voĉaj aŭ skribaj pri la senco de nia agado por Esperanto, kies ĉefa enhavo resumeblas tiel: Esperanto estas io bona por plibonigi la mondon, kaj se la mondo ne agnoskas tion, ni tamen daŭrigu informi ĝin. Iam ĝi devos agnoski. Mia granda admiro en la lasta jardeko estis por



lia kapablo ekstari, ĉiam kiam tio necesis, kaj diri (ĝenerale: skribi) al la Prezidanto de la Eŭropa Komisiono aŭ al la brazila Ministro pri Kulturo, kial ili eraras pri Esperanto. Ni vere perdis bonan kamaradon de la simplaj, agantaj esperantistoj, kiu simple batalis por Esperanto en momento en kiu, multaj pensas, ke estas pli oportune trovi apudan niĉon, en kiu trankvile ripozi. Cetere, lia kapablo ne pozi kiel granda verkisto, sed interesiĝi pri komencantoj kaj eĉ gvidi konversacian rondon en apuda loko, aldonas ion esencan por kompreni la homon.

Sed mi ne rajtas ne diri, ke ni ankaŭ samopiniis pri la lingvo mem, kiu estas bona kaj devas resti bona, malgraŭ la klopodoj de tiuj, kiuj opinias ke Esperanto estas lingvo kiel ĉiuj aliaj, kaj ke ĝia sola manko estas la manko de malregulaĵoj. Li estis mia blanka kavaliro kontraŭ la nigraj (en kelkaj periodoj nigregaj) Akademio kaj esperantologio kaj kunligitaj plenaj verkoj. Lia lasta konsilo al mi de antaŭ kelkaj monatoj pri vorto samsignifa kun „kardiologo“ estis iom amuza: Se oni diras dento/dentisto kial ne koro/koristo? La ĉinoj, laŭ li, nin dankus.

Mi sentas min tre sola.

Renato Corsetti

Memore kaj danke

Mi memoras kelkajn mallongajn renkontojn kun Claude Piron, ĉiujn tre agrablajn. Precipe unu, en Antverpeno, kiam ni iom diskutis pri lia psikologia



verko *Kiel personeco sin strukturas*, pri kiu mia edzino tre interesiĝis; ŝi aparte memoras lian viglan kaj vervan parolon. Sed Piron estis ne nur eminenta psikologo, li estis ankaŭ poeto. Lian poemaron *Malmalice* mi havis la honoron recenzi kelkajn jarojn antaŭe. Tie mi skribis, ke la poeton karakterizas senhezita donemo el sia propra animo, probable pli malavare kaj elfareme

ol estas kutime ĉe niaj poetoj. Kaj tia estis Piron: lian tutan karieron, lian abundan, multvarian verkaron, distingas tia malavara, entuziasma donemo. Kaj ne estas troigo diri, ke tie lia fervora sindediĉo al Esperanto havis gravegan rolon. Tion aparte atestas lia libro *La bona lingvo*, probable lia plej konata verko. Tie Piron alportas gravan materialon en formo de esploro pri la ena potencialo de la lingvo. Lia detala pritrakto de la eksterordinara kreopovo de Esperanto surbaze de ĝia struktura karaktero estas daŭre valora kontribuo al la esplorado de ĝia lingva potencialo. En tio li brave kuniras kun alia majstro de la lingvo, Ivo Rotkvić, kiel tio plej emfaze prezentiĝas en ties *Tragedio en la universo*. Estas ankaŭ interese rimarki similan emfazon en la laste aperintaj artikoloj de la nova prezidanto de UEA, Probal Dasgupta. Mi havas la impreson, ke la ĉi-

koncernan heredaĵon de Claude Piron la esperantistoj ĉiam pli konsideros pripensinda kaj sekvinda. Li donis al ili multon, kaj tiu multo meritas daŭran kaj kreske efikan vivon.

Baldur Ragnarsson

Claude Piron, i.a. poeto

Claude Piron, pseŭdonome Johán Valano, havis multajn verajn amikojn. Ne nur la vastan publikon de la serio de romanoj inaŭgurita de *Ĉu vi kuiras ĉine?* en 1976, sed ankaŭ aliajn aŭtorojn, ekzemple inter la anoj de la ibera grupo, kiujn li renkontis en Barcelono en 1993. En personaj kontaktoj li naskis spontanegan simpatian.



Ĉu vi kuiras ĉine? havis la meriton vastigi kaj profundigi la sulkon replugitan de Lorjak per *Neologisme* du jarojn pli frue. Kvalite ĝi rangas kiel populara literaturo, meze inter la du ekstretoj de la romankvinopo. Ĉi-rilate mi plene konsentas kun la prijuĝo de Sten Johansson¹⁾ pri la malklimaksa *Ĉu ŝi mortu tra-fike?* (de Johán Balano): „Sendube la verkado de ĉi malerotika tedajo helpis al Piron liberiĝi de ia inhibicio, sed li povus rezigni ĵakuli sian stultajon sur la legantojn“; kaj pri la atentinda *Ĉu ni kunvenis vane?*: „Ĝiaj medioj realismaj (aŭ realisme ŝajnaj) faras ĝin la plej bona kaj interesa el la *Ĉu*-serio, almenaŭ laŭ mia opinio“. Mauro Nervi resumas perfekte la stilon de lia prozo en recenzo²⁾ pri *Malmalice*: „La lingvouzo estas senmakula, kion oni povis atendi de tia prozisto; la esprimmaniero estas simpla kaj [rekta], ĝuebla ankaŭ por tiuj legantoj kiuj ne spertas pri literaturaj artifiko“.

Pri liaj verkoj kiel artikolisto kaj eseisto, diversaj homoj (inter ili mi) kritikis la simplismon de liaj argumentoj. Lastatempe vekis kritikojn lia artikolo „Ĉu la tuta mondo suferas pro afazio?“³⁾, sed pli frue ĉefe lia libro *La bona lingvo*; en la vortoj de Silfer, „li fariĝas malgraŭvole (sed ĉu kontraŭvole?) la ikono de la bonlingvismo, de la volapukeska esperantismo“. En letero al mi, kun dato 15.10.1994, Claude skribis ke, male al tio, kion multaj „senbaze atribuas al mi[,] mi neniam malrekomendis la uzon de senutilaj neologismoj, mi nur diris, ke mia opinio la lingvo post iom da tempo senbalastiĝos je ili. (El kio eblas konkludi, se mi pravus, ke verko havos des pli multajn ŝancojn esti daŭre legata – laŭ longtempa historia perspektivo – ju pli ĝia radikprovizo respektos la normalan lingvon)“. Eble ne li, sed ni ceteraj, komprenis lian argumentaron tro simple, aŭ eble ankaŭ ĝi evoluis kaj nuanciĝis (malkiel tiu de lingva korsetismo) laŭlonge de la tempo.

Kiel sciante, profesie li estis psikoterapiisto („plifeliĉigisto“). Konkizajn ekzemplojn de faka apliko en Esperanto ni trovas en lia psikologia analizo de la manifesto de Raŭmo⁴⁾; el ĝi mi citis komence de *La liturgio de l'foiro*⁵⁾, por kiu li verkis la simil-objektan postĉapitron „Pri ‘eminentaj’ esperantistoj“⁶⁾, daŭre aktualan.

Eble iam lia suka, plurtema letero de 1994 legeblas kaj konsulteblos en la viena E-muzeo. Dume mi rekomendas relegi du longajn poemojn el *Malmalice*, nome „Solena saluto“ kaj „Senpoveco“, kiuj, laŭ la opinio de Baldur Ragnarsson en *La lingvo serena* (p. 511), „viciĝas inter la plej gravaj poemoj de nia literaturo, teme kaj konstrue“.

Jorge Camacho

¹⁾ <http://esperanto.net/literaturo/roman/libr/curec.html>


²⁾ <http://esperanto.net/literaturo/lf/malmalirec.html>

³⁾ <http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/lingvoj2.htm>

⁴⁾ http://www.helsinki.fi/~jslindst/piron_raumo.html

⁵⁾ http://www.geocities.com/al_fab_et_o/camacho/liturgifoir.html

⁶⁾ http://www.geocities.com/al_fab_et_o/camacho/liturgifoir.html#pir



Li pluvivos en sia verkaro

Kvankam miaj kontaktoj kun Claude Piron estis relative maloftaj, mi ĉiam admiris liajn produktivecon, multflankecon kaj oratoran talenton. Laŭ mi homo ne mortos, se oni memoros lin. Tial en unu el la sekvaj kalendaroj de *Informilo por*

Interlingvistoj (IpI) mi publikigos la bibliografion de la verkoj de Claude. Li pluvivos ankaŭ en sia verkaro.

Detlev Blanke

Claude Piron kaj Vojaĝo en Esperanto-lando

Miaj leteraj kontaktoj kun Claude Piron komenciĝis en la unua duono de la 1970-aj jaroj. Sed nun mi volas paroli nur pri lia ligo kun mia libro *Vojaĝo en Esperanto-lando*.

En la jaro 1990 mi finpreparis la manuskripton de tiu libro, kies unua eldono aperis en Moskvo en la jaro 1992. Mi enprenis en mian libron du verkojn de Claude Piron. La unua estis la novelo *Terura novaĵo*, kiun mi prenis el la jubilea antologio *Trezoro*. Frapis min, ke normala rakonto estis verkita per tre simpla lingvaĵo. Tial mi metis tiun novelon en la komencon de la libro – en la trian lecionon. Kiel unu el la taskoj de *Lingva praktiko*, mi proponis verki daŭrigon de la rakonto, kion Michela Lipari komentis jene: „Verkigi la sekvon de la Piron-a rakonto estas brila ideo!“ Vere, miaj lernantoj verkis multajn interesajn daŭrigojn; unu el ili – kiun verkis Phil Dorcas – aperos kiel novelo en la dua numero de *Beletra Almanako*.

Mi frande legis la krim-romanojn de Claude Piron kaj mi elektis por la leciono 14 fragmenton el lia libro *Ĉu ni kunvenis vane?* – Kial ĝuste el tiu libro? Unue, ĉar ĝi havas streĉan intrigon; due, ĉar la agado okazas en Kazahio (tiam Sovet-Unio), kiun Claude Piron vizitis foje, kaj mi bone konis la sovetiajn realaĵojn; trie, ĉar la libro estas gaja, vigla kaj verkita per klara kaj facile komprenebla lingvaĵo; kaj kvare, ĉar la intrigo havas fortan judan fonon. Nu, nemultaj scias tion, kion iam Claude Piron rakontis al mi. La patra avo de Claude, kiu estis ankaŭ Piron, originis el Hispanio; li estis sefarda judo kaj servis kiel rabeno en Belgio.

Estas amuze vidi, ke multajn jarojn poste Claude Piron elektis por sia retejo ĝuste tiun novelon *Terura novaĵo* kaj ĝuste tiun fragmenton el la krimromano *Ĉu ni kunvenis vane?*

En la jaro 1996, kiam mi jam loĝis en Usono, mi komencis radikale relabori mian libron *Vojaĝo en Esperanto-lando* por eldonigi ĝin ĉe UEA. Mi plu zorge fosis en la Esperantaj literaturo kaj gazetaro por trovi pliajn malgrandajn diamantojn. Kompreneble, mi enprenis fragmenton el la libro de Claude Piron *La bona lingvo*, en kiu la aŭtoro klarigas sian pozicion pri la evoluo de Esperanto kaj donas ĉarmajn ekzemplojn de nebanala lingvouzado. Ankaŭ tiun fragmenton mi enmetis en la lecionon 14.

En la jaro 1995 Claude Piron ricevis premion en Japanio kaj rezulte li publikigis en la revuo *Oomoto* dankan artikoleon. Tiun artikoleon mi mallongigis kaj rearanĝis kaj rezulte mi ricevis simpatian tekston, al kiu mi donis la titolon „Mi kredas je la bono. Mi kredas je Esperanto“ kaj enmetis en la 3-an lecionon. Unu el miaj lernantoj iom kritikis la enhavon de la teksto kaj, laŭ mia konsilo, sendis sian kritikon al la aŭtoro. Claude Piron respondis iom konfuzite, pravigante sin per tio, ke li verkis la artikolon por iu konkreta okazo, kaj la originalo havis iom alian formon. Mi respondis al Claude Piron, ke li ne devas konfuziĝi, ke la artikolo estas tre bona. Kaj rezulte, li enmetis tiun artikolon en sian retejon sub la originala titolo „Kial kaj kiel lerni Esperanton“ ĝuste en tiu formo, kiel ĝi aperis en *Vojaĝo en Esperanto-lando* kaj kun la sama noto „Mallongigita kaj rearanĝita“. Tiu artikolo havis tiel grandan sukceson, ke la revuo *Esperanto* (2005, majo) reprenis ĝin el *Vojaĝo en Esperanto-lando*, kio per si mem estas unika okazo.

Kiam en la dua duono de la 1990-aj jaroj Claude Piron aperis en interreto, li publikigis en iu diskutlisto apologion de Esperanto en la formo de anglalingva kvazaŭpoemeto en prozo. Ĝi tiel plaĉis al mi, ke mi petis Claude Piron fari ĝian Esperantan version. Li faris tion, kaj mi publikigis ĝin same en la 3-a leciono. Ĉar la verketo havis poste grandan sukceson ĉe la legantoj, mi ne povas deteni min citi tiun etan majstroverkon.



*Kiam infano priĝemis sian suferon en Esperanto,
kaj apud vi ricevis esperantlingve konsolon,
kiam vi pene laboris kun grupo da amikoj
kaj kunspertis en Esperanto la ĝojon kaj la zorgojn,
kiam, adoleske, vi flustris pri sekso en Esperanto,
kaj poste esprimis en ĝi vian amon,
kiam rifuĝinto rakontis al vi en Esperanto
la turmentojn, kiuj igis lin forfuĝi,
kiam vi vidis spektantojn ĝislarne kortuŝitaj
ĉe aŭdo de poemo Esperanta
kaj ĉeestis tiulingvajn kverelojn,
kiam en diskuto pri politik' aŭ religio
vi diris en Esperanto viajn timojn kaj indignon,
kaj kiam, helpite en Esperanto,
vi tiulingve prikantis
viajn dankemon kaj raviĝon
pri la mirindeco de homa solidaro,
neniam, neniam plu vi taksos Esperanton
lingvo senanima, sentsenta, sennuanca.
Mi scias.
Ĉion ĉi mi travivis.*

Kun kvin verkoj en *Vojaĝo en Esperanto-lando* Claude Piron estas rekordulo ĉi-rilate. Sed ne estas ĉio. Li tralegis en manuskripto siajn verkojn, destinitajn por mia libro, kaj ankaŭ la biografian noton pri li kaj aprobis ĉion. Por la dua eldono de *Vojaĝo en Esperanto-lando* mi petis Claude Piron elpensi reklaman frazon; kaj li elpensis; kaj ĝi aperis sur la dorskovrilo de la libro: „Kial pagi flugbileton? Lege VOJAĜU al Esperanto-lando!“.

Claude Piron partoprenis en la prezento de la dua eldono de *Vojaĝo en Esperanto-lando* en Fortalezo dum la 87-a Universala Kongreso, kaj tie mi subskribis lian ekzempleron de la libro.

Dankon al vi, Claude, pro tio, ke vi ne vane vivis en tiu ĉi mondo. Viajn verkojn legos, ĝuos, studos kaj utiligos ankaŭ estontaj generacioj de esperantistoj.

Boris Kolker

Nur lia koro ne plu batas

En la tutmovada funebrado mi volas aldoni rakonton pri specifa sperto kun Claude Piron. Sperto kiun konas nur tre malmultaj homoj, sed kiu meritas resti en la historio pli vaste konata. Tial mi verkas ĉi tiun leteron.

La togolanda esperantisto Gbeglo Koffi estas mia kunlaboranto kaj amiko. Ne nur nun, sed jam ekde 1984. Nia abunda korespondado ĉiam temis pri Esperanto, neniam pri personaj temoj. Tial estis rimarkinda tiu ĉi unusola frazo en la fino de lia letero de la 13-a de aŭgusto 1990, ke „ĵus naskiĝis al mi filo“.

Mi supriziĝis, gratulis. Temis ja pri lia unua infano. Sed tuj poste ni daŭrigis la kutiman kunlaboradon por Esperanto en Afriko. Pasis semajnoj, pasis monato. Tiam venis informo je la dato 2-10-90 ke la koro de la fileto ne estas en ordo. La nomo de la malsano estas „dispneo“ kaj bezonas operacion kiu en Togolando ne estas disponebla. Koffi petis min serĉi helpon en Eŭropo. Kion fari? Mi sendis leterojn kaj telefonis al kuracistoj kaj al iuj esperantistoj.

Tiuj sendis min al aliaj adresoj de hospitaloj kaj helporganizaĵoj, ekzemple Flying Doctors, Terre des Hommes, Blue Babies.

Tio ne iris rapide en la tempo kiam ne jam ekzistis retmesaĝoj. Jam la 10-an de oktobro respondis Claude Piron pri sia ekkontakto kun la svisa branĉo de Terre des Hommes kaj kun privata korkliniko. Samtempe mi trovis adresojn de katolika helporganizo St.Vincentius en Niĝerio kaj Ganao, kie operacio povus okazi. La malgranda Dzifa dume kuŝis en la plej bona hospitalo de Togolando, kaj devis prepari sin por transporto al operaciejo en Eburbordo aŭ Niĝerio.

La 15-an de novembro la patro Gbeglo informis min pri klopodoj de sia kuracisto, kiu transdonis la tutan dosieron al la svisa reprezentantino de Terre des Hommes en Togolando. Urĝas la decido. Tiam mi telefonis kun Claude Piron, la 30-an de novembro. Ties voĉo kvietigis min: Terre des Hommes en Lausanne akceptis lian peton kaj operacios la bebon en januaro.

Ankaŭ aliaj hospitaloj en Nederlando estus pretaj, postulante favoran tarifon de nur 17 000 guldenoj (8 000 eŭroj) plus kostoj de flugado. Sed jam la afero en Svislando estis en bonaj manoj. Claude Piron rekte kun Gbeglo Koffi organizis la transporton al Ĝenevo. La 21-an de januaro ĝi okazis. La 13-an de majo 1991 Dzifa revenis hejmen, sana.

Dzifa kreskis kaj fariĝis junulo. Juna viro kiu havas pensojn kaj sentojn. En la fino de 2007 Afrika Centro Esperantista (ACE) publikigis lian poemaron *Miaj unuaj pensoj*, kiun li dediĉis i.a. al Claude Piron. Ricevinte sian ekzempleron, Claude reagis per la sekvanta retmesaĝo:

Kara Dzifa!

Kia bona surprizo! Vi diris: „eble min vi forgesis“. Absolute ne! Tio ne eblus! Mi ege bone memoras (kaj ankaŭ mia edzino) kiam ni vizitis vin en la hospitalo en Ĝenevo. Plurfoje ni vizitis vin. Mi memoras la ĉambron, en kiu vi estis. Mi memoras, ke foje ni iris al speciala ĉambro, ludejo, kie estis ĉiaspecaj ludiloj taŭgaj por eta bebo. Sed ĉefe mi memoras la unuajn vortojn de la flegistino, kiu kondukis nin al via ĉambro, post la operacio. Mi demandis, kiel vi fartas. Ŝi respondis: „Fizike, li fartas tute bone. Sed ekde la operacio li aspektas malĝoje kaj tute ne plu ridetas.“

Tiu respondo timigis nin. Ni nin demandis, ĉu la operacio – eble la anestezio – iel havis malbonan efikon al via cerbo. Vi ja estis tiel eta, tiel juna, tiel delikata, kvazaŭ facile difektebla! Ni do alvenis al via ĉambro, kaj konstatis, ke, efektive, vi aperas malgaja kaj tute ne ridetas. Vi eĉ iom ploris. Tio ne estis miriga. Vi ja ne konis nin, vi estis en medio tute stranga por vi. Nu, ni komencis ludi kun vi, karesis kaj lulis vin, kantis kantetojn por kapti vian atenton. Sed vi plu kaj plu aperis malĝoja kaj plorema. Estis tre kortuŝe, ĉar ŝajnis, ke vi plendas pri io, senparole, kompreneble, vi ne parolis tiutempe, sed ni ne sciis kiamaniere reagi al via plendo, kiun ni ne povis kompreni.

Kaj jen mi diris al mia edzino: „Eble li estas malĝoja ĉar la tuta ĉirkaŭaĵo estas tro stranga por li. Li ne aŭdas la lingvon, al kiu li kutimiĝis en sia lando. Eble mi provos imiti la sonojn de afrika



lingvo kaj tio helpas.“ Kompreneble, mi eĉ ne scias, kiel nomiĝas via gepatra lingvo, nek kiel ĝi sonas, mi do tute ne esperis rezulton, sed ĉar ni estis tie, kaj havis nenion specialan por fari, kial ne? Tiam mi memoris, ke en diversaj lingvoj de okcidenta Afriko ekzistas aparta sono, kiun oni prononcas prononcante samtempe „g“ kaj „b“. Ĉar via familia nomo estas skribata „Gbeglo“, mi pensis, ke la du unuaj literoj reprezentas tiun sonon, kaj mi provis eligi ĝin kaj prononci ĝin kun vokaloj kaj aliaj sonoj, kiuj kompreneble signifis nenion, sed per kiuj mi provis imiti la muzikon de afrika lingvo. Mi tute ne sukcesis prononci samtempe „b“ per la lipoj kaj „g“ per la gorĝo, sed mi provis kaj provadis. Certe, se iu ekstera ĉeestus, li trovus min tute ridinda! Fakte la solaj afrikaj lingvoj kiujn mi aŭdis antaŭe estis la svahila, la lingala (el la regiono de Kinŝaso, kie mi foje laboris) kaj la kinjarwanda, kiun mi aŭdis dum mallonga laborperiodo en Ruando. Mi provis imiti la sonojn de tiuj. Sed vi plu konservis vian malĝojan esprimon. Se oni filmus min tiutage en via ĉambro, kaj vi hodiaŭ vidus la filmon, vi certe ridegus vidante, kiel mi esperas tuŝi vian koron aŭ vian menson per tiu klaŭnado. Sed – kio estas tute normala – estis nenia rezulto. Kaj tiam mi pensis: „Eble se mi diros la nomon de lia patro, Dzifa rekonos ĝin, kaj tio efikos“. Kaj tiam mi ripetis „Koffi“, „Koffi“, „Koffi“. Tuj via vizaĝo ŝanĝiĝis, vi antaŭe tenis la kapon rigardanta al la planko, sed tuj kiam mi diris „Koffi“, via kapo releviĝis, vi rigardis min rekte en la okulojn. . . kaj vi ridetis!

Tian momenton mi neniam povus forgesi, eĉ se mi vivus 200 jarojn. Estis unu el la plej belaj momentoj de mia vivo. Ankaŭ mia edzino estis superplenigita de ĝojo. Ekde tiu momento, via malĝoja esprimo malaperis de sur via vizaĝo, ni kune ludis, kaj vi aspektis tute kontenta. Dum la posta vizito, vi eĉ tute laŭte ridegis. La flegistinoj tre miris pri via ŝanĝo. Ili certe sin demandis, per kia mirakla metodo ni sukcesis tiri vin el via konstanta aĉa humoro. Mi deziras al vi bonan sukceson en la venontjara abiturienta ekzameno. Transdonu miajn plej korajn salutojn al via patro. Mi ĉiam bedaŭris, ke mi ne povas teni la kontakton kun li, sed mi vere estis kaj estas tro okupita. Mi havas tri gefilojn. Filinon 45-jaran, kiu estas instruistino, filon 41-jaran, kiu estas komputilisto, kaj filinon 39-jaran, kiu estas ankaŭ instruistino, sed nun ne laboras ekstere, nur hejme, sed ĉefe prizorgas siajn du filojn, unu 8-jaran kaj la alian 6-jaran. Plej kore salutas vin

Claude Piron

Ĉu necesas fermi la artikolon per vortoj? Claude Piron, la verkisto, psikologo, intelektulo, estis samtempe homo kiu agis kiam lia helpo estis vokata. Kiel diras juda proverbo: Tiu kiu savas unu vivon, savas la mondon. La koro de la eta Dzifa pro Piron plu batadis. Nun ĝi forte batadas kaj esprimas sin en poemoj. Nur la koro de Claude Piron ne plu batas.

Hans Bakker



Clerici legis la esperantlingvan mesaĝon de Probal Dasgupta. Ni ĉiuj ŝokiĝis pro la subita forpaso de Claude Piron, sed la ceremonio estis celebrazo al multifaceta homo, kies mirindaj talentoj mankos al ni kaj al la tuta movado.

Claude Nourmont

Mesaĝo de la Prezidanto al la funebra ceremonio

Claude Piron estis inter la ege malmultaj esperantistoj, kiujn mi konis kiel referencajn personojn enkorpiĝantajn la lingvon mem. Tia kono por multaj baziĝis simple sur liaj verkoj. Sed mi havis la bonan ŝancon esti en tre longdaŭra koresponda rilato kun li. Ni komencis diskuti mian malnetan angligon de lia fama eseo pri tio, ĉu Esperanto fakte estas azia lingvo, kaj el tio rezultis priteoria dialogo.

Tamen mi ne tro okupiĝu nun pri mia propra aliro – ni ĉiuj, pere de liaj tekstoj kaj pli lastatempe pere de lia rete havebla voĉa produktaro, havis konon de lia profunda kapablo konkrete interesiĝi pri difinitaj homoj kaj aferoj kaj surbaze de tiu konkreta interesiĝo esprimi plej simple la plej profunde pripensitajn reagojn al tio, kion li perceptis. Aparte vastan konantaron havis Claude Piron pri tio, ke ankaŭ liaj krimromanoj esprimis same lucide liajn ideojn pri la heimco.

Piron ne nur en teorioj kaj romanoj sed en sia vivlonga praktikado prezentis al ni ĉiuj la arton percepte rilati al konkretaj personoj kaj pejzaĝoj, ŝanĝi sin mem per tiuj perceptoj, kaj distili la rezulton en simplan, konscie lingvan prezenton de sia aliĝo. En Piron, tiu arto kaj la „bona lingvo“ Esperanto bezonis identan flegadon; en li, tiu arto fariĝis lia bona lingvo, lia lingvo strebanta esprimi la homan bonecon en la konstruado de kiel eble plej simplaj vojoj inter la bezonantoj de helpo kaj la eventualaj donantoj de tiu specifa helpo.

Li estis ĉe la pinto de sia kapablo donaci al ni ĉiuj la malavaran fluon de tiu unika spirito, kiun li kreis; kaj neniu el ni estis preta aŭdi la drastan novaĵon, ke li tiel abrupte forlasis nin. Ni estas en stato de ŝokiĝo, kaj bezonos longan tempon por



kunmeti niajn sentojn por pli inde esprimi al li nian omaĝon. Dume, en la nomo de UEA, mi komunikas al lia familio kaj liaj aliaj plej intimaj kunuloj la funebrajn sentojn de la tuta asocianaro pri la forpaso de tiu Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, krom miaj propraj kondolencoj pro la forpaso de persona amiko.

Probal Dasgupta

Ĉu funebro aŭ celebrazo?

Katolika kapelo ne sufiĉe grandus, tial la ceremonio pro la forpaso de Claude Piron okazis en la protestanta preĝejo de Gland, ekumena praktiko kiun li certe aprobus. Internacia pastra kvinopo celebris la transiron de eksterordinara paroĥano en alian mondon. Partoprenis ĝin multaj familianoj, amikoj, esperantistoj. Ranieri

Claude Piron ne plu inter ni

Claude Piron, Honora Membro de UEA, populara Esperanta verkisto kaj pedagogo kaj amata preleganto, forpasis la 22-an de januaro hejme en Gland, Svislando. Li naskiĝis en Namur, Belgio, en 1931.

Piron laboris kiel tradukisto-protokolisto por Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko 1956-1961 kaj poste por la Monda Organizaĵo pri Sano i.a. en Ĝenevo, Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969. Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakol de la Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Poste lia ĉefa aktiveco apud psikoterapia praktikado estis profesie trejni junajn psikoterapiistojn.

Claude Piron esperantistiĝis en 1942. Li membriĝis en Tutmonda Junular-Organizo TJO (la posta TEJO) en 1946 kaj en UEA en 1947. Ekde 1958 li estis dumviva membro de UEA. En 1958 li kunfondis Esperanto-klubon ĉe UN en Novjorko kaj fariĝis ties unua prezidanto. De aprilo 1963 ĝis majo 1966 li estis redaktoro de *Svisa Espero*. Li prelegis pri sia scienca fakol i.a. en Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo; la kursoteksto aperis ankaŭ presite, *Kiel personeco sin strukturis?* (1978). Dum la 64-a UK en Lucerno en 1979 Piron estis rektoro de Internacia Somera Universitato. Membro de la Akademio de Esperanto li estis de 1979 ĝis 1988.

Jam frue Piron ekverkis en Esperanto, gajnante premiojn en la poezia branĉo de la Belartaj Konkursoj de UEA en la jaroj 1954-1956. Per la publikigo de la furora verko *Ĉu vi kuiras ĉine?* (1976; 2-a eld. 1996) komenciĝis por Piron fekunda verkoperiodo kun la pseŭdonimo Johán Valano, dum kiu aperis la poemaro *Malmalice* (1977; 2-a eld. 2001), kvar pliaj krimromanoj en la „Ĉu“-serio, la krimrakontaro *Ĉu rakonti novele?* (1986) kaj la sciencfikcia

romano *Tien* (1997). Al la populareco de lia prozo kontribuis la vigla rakontado kaj la facila sed esprimforta lingvaĵo. Piron estis granda porparolanto de lingvo, kiu evitas novismojn kaj klopodas efike eluzi proprajn eblojn de la Esperanta vortprovizo. Siajn principojn li klarigis profunde kaj polemike, interalie per psikologiaj eltrovoj, en la libro *La bona lingvo* (1989; 2-a eld. 1997) kaj li aplikis ilin tute precipe en facillingvaj rakontoj por *Kontakto* en la 90-aj jaroj kaj en didaktike verkitaj romanetoj por komencantoj. Eksterordinare furora fariĝis la krimromaneto

Gerda malaperis (1983), multfoje represita kaj vendita en miloj da ekzempleroj. La kantokasedo *Frandu Piron* (1982) atestas pri lia spriteco kaj multflankeco.

Claude Piron famiĝis ankaŭ kiel unu el la plej elstaraj kaj vervaj pledantoj por Esperanto kiel solvo de la lingva problemol en la internacia komunikado. Krom en Esperanto-aranĝoj, i.a. dufoje en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, li faris sennombrajn prelegojn antaŭ ne-esperantista publiko, i.a. en seminario ĉe Unesco (1986) kaj dum studotago en la Eŭropa Parlamento (1993), kie li traktis la psikologian reziston al la pristudo de lingva komunikado. Li publikigis diverslingve

multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado. Por la serio de Esperanto-dokumentoj li verkis plurajn kajerojn, i.a. *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* (1977) kaj *Psikologiaj reagoj al Esperanto* (1988). Lia ĉefverko ĉi-kampe estas la franclingva libro *Le défi des langues* (1994), psikanalizo de la internacia komunikado kaj priskribo de Esperanto kiel reale funkcia lingvo.

Universala Esperanto-Asocio aljuĝis al Claude Piron du el siaj plej gravaj distingoj. En 1994 li ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi pro sia kontribuo al la antaŭenigo de internacia amikeco per Esperanto. En 1998 li fariĝis Honora Membro de UEA.



Ĉu li forpasis tro frue?

Sub tiu ĉi titolo trideko da israelaj esperantistoj omaĝis al Claude Piron la 5-an de februaro en la Tel-Aviva Esperanto-klubo.

La vespero komenciĝis per dolĉa surprizo: tergloba kukol kun E-flageto (por Oded Gilad, estrarano de ELI, kiu samtage festis sian naskiĝtagon). Amri Wandel prelegis per komputila prezentaĵo pri la vivo kaj Esperanta mondo de Piron.

Sekvis personaj rememoroj de pluraj s-anoj (Matilda Landau, Esti Saban, Josi Šemer (en la foto), Aleks

Kerbel, Amri Wandel) pri renkontiĝoj kaj amikaj kontaktoj kun Claude Piron. Oni laŭtleĝis la tekston de Boris Kolker, verkitan speciale por tiu vespero, kiu rakontis i.a. pri la juda avo de Piron. Enrika Arbiv kantis la kanton pri *Gerda Malaperis*, kiun ŝi verkis en E-kurso kun la kursgvidanto Doron Modan, kaj prezentis en la koncerto dum la UK en Florenco.



Fine, nia ĉefdelegito Jehoŝua Tilleman kaj Eldad Salzman rol-legis mallongan rakonton de Piron. La verda flago kun la bildo de Piron surmure adiaŭis la klubanojn kaj bonvenigis la lernantojn de la E-kurso kiu okazis samĉambre tuj poste. Supozeble la instruisto Doron denove uzis *Gerda Malaperis*...

Amri Wandel

„Lingvoj: trezoro de la homaro“ Alvoko kunlabori pri la Kongresa temo

Jam en majo 2007 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2008 *Internacia jaro de lingvoj*, rekonante, ke „vera plurlingvismo antaŭenigas unuecon en diverseco kaj internacia interkompreno.“

Poste en la jaro s-ro Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, parolis pri la „decida graveco“ de lingvoj por „la multaj defioj, kiujn la homaro devas alfronti dum la venontaj jardekoj“. Li emfazis la „kernan gravecon“ de lingvoj en la atingo de la celoj de tiaj internaciaj iniciatoj kiaj *Edukado por ĉiuj*, kaj la *Jarmilaj evoluigaj celoj* aprobitaj de UN en 2000. Li vidas „strategian rolon“ por lingvoj en la antaŭeniro al „daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka“. Kaj la identeco-donan funkcion de lingvoj li nomis „nepra“ por la paca kunezkisto de individuoj kaj homgrupoj.

En tiuj ĉi diraĵoj, UN kaj Unesko fakte eĥas la larĝe dividitajn valorojn de la Esperanto-komunumo; valorojn kiujn oni trovas, ekzemple, en la Praga Manifesto, tiu ŝlosila dokumento de la Esperanto-movado. Tiuj ĉi valoroj inkluzivas la celojn de lingva demokratio, efika multlingva edukado, la savtenado de lingva diverseco, kaj la pli ambicia celo de homa emancipiĝo. Tiel, la temo de la ĉi-jara Universala Kongreso – *Lingvoj: trezoro de la homaro* – tute akordiĝas kun la *Internacia jaro de lingvoj*.

Plue, la Uneska estro aldonis plian urĝecon al la traktado de lingvaj defioj per la atentigo, ke „en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7 000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun malpli ol kvarono el ili estas uzata en la lernejoj kaj interreto, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon, forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero.“ Li forte emfazis la bezonon de lingvopolitiko kiu ebligis „la uzon de [la] gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la reĝo de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo.“ Multaj el ni en Esperantujo konsentus kun lia diagnozo, ke alfrontas la homaron baldaŭ kaj katastrofa kultura malriĉiĝo.

Kadre de tiuj ĉi sciigoj kaj prognozoj, ni invitas vin, dum la Universala Kongreso ĉi-jare pripensi diversajn aspektojn de tiu ĉi temo inkluzive jenajn interligitajn demandojn:

- ◆ En kiu senco oni povas oni nomi lingvojn trezoro?
- ◆ Kiom ampleksas kaj diversecas tiu ĉi trezoro?
- ◆ Kion faras la homaro por dokumenti tiun ĉi trezoron?
- ◆ Tiom da lingvoj estas endanĝerigitaj; kion faras la homaro por savtenadi tiun ĉi trezoron?
- ◆ Ĉu eĉ valoras konservadi la trezoron? Ĉu eble tro altas la kostoj de la konservado? Kio estas la kosto de la nekonservado de tiu ĉi trezoro?
- ◆ Kion povas fari la Esperanto-komunumo en la savtenado de endanĝerigitaj lingvoj?
- ◆ En multlingva mondo, kiel oni administru la ofte konfliktantajn postulojn de la memdecido, naciigado, ekonomiaj bezonoj kaj la paca kunezkistado?
- ◆ Tra la historio, kiel la homaro faris pontojn trans lingvojn kaj kulturojn?
- ◆ En la centjariĝo de Universala Esperanto-Asocio, kiujn iniciatojn ni povas montri kiel niajn kontribuojn al la supraj demandoj?
- ◆ Kiajn avantaĝojn proponas Esperanto kiel plutenebla, long-perspektiva solvo al la lingva defio?

Kiel tutmonda komunumo kiu dum pli ol jarcento jam montras vivantan ekzemplon de efika, interkultura komunikado, la Esperanto-komunumo kompreneble bonvenigu la atenton de la internacia komunumo al lingvaj defioj. Kaj dum la Internacia jaro de lingvoj, kaj la centjariĝo de UEA, nia unika, 120-jara, interkultura fenomeno Esperanto certe disponigu siajn komprenojn al la tutmonda komunumo. Kaj kie estus pli bone ol la ĉi-jara kongresurbo Roterdamo – kie troviĝas la Centra Oficejo de UEA – por pritrakti la temon! Ni invitas vian vigan partoprenon en la Kongresa temo.

A. Giridhar Rao
agiridhar.rao@gmail.com

Kleriga Tago

Por la sesa fojo okazos en la kongresa lundo la Kleriga Tago. Proponoj por prelegoj, podiaj diskutoj, partoprenigaj programeroj, kiuj rilatas ekzemple al movado, lingvoj, informado, interreto, organizado ktp estas bonvenaj ĉe Michela Lipari michela.lipari@tiscali.it kaj Claude Nourmont moonmont@pt.lu, kiuj kunorganizas la tagon.

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la novembra numero.

marto

01-08: Mediteranea Esperanto-Semajno en Saint-Raphaël, Francio. Antaŭtagmeze E-kursoj kun Josée Lafosse kaj Jean Pierre Boulet, posttagmeze promenado, piederado, familia vivo, vespere distraĵoj. ✉ Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio, aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR - 83600 Fréjus, Francio. ☎ +33(0)494956618; +33(0)494830688. ✉ prezmoni@hotmail.com.

07-09: Kreiva metiejo por verkemuloj kaj kulturemuloj en la kastelo Budmerice apud Trnava, Slovakio. ✉ www.skej.esperanto.sk/rangoj.php?

07-09: Studsemajnfino en Vlaardingen, Nederlando, por ĉiuj aĝo kaj nivelo. ✉ eosw2007@hetnet.nl; www.esperanto-nederland.nl/bonvenon/studweekesp.php.

14-16: 4-a Iberia Renkontiĝo en ĉarma mediteranea urbo Benicàssim, Valencio, Hispanio. ✉ www.esperanto.cat/ir2008/.

14-16: Junulara Esperanto-Renkonto, JER, en la urbo Szombathely, Hungario (apud la aŭstra landlimo). ✉ Hungara Junulara Esperanto-Asocio, pk. 87. HU-1675 Budapeŝt. ☎ +3613620149, ✉ +36206611757. ✉ +3612828885. ✉ Ottrok Andi, o.andi@freemail.hu.



19-25: 32-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) apud la maro en Senigallia. La temo: 2008, internacia jaro de la lingvoj: defioj kaj perspektivoj. ✉ Nicola Ruggiero, ✉ ijf.admin@esperanto.it; http://iej.esperanto.it/ijf/2008/.

21-25: Tutfranca Esperanto-Renkonto, okcidente de Marseille. Kunveno de diversaj francaj E-asocioj, kongresoj de Esperanto-France, SAT-Amikaro, junuloj, instruistoj, laboristoj, katolikoj. Konkursoj, festivaloj, prelegoj, koncertoj. ✉ http://esperantomartiques2008.unblog.fr; mcerisay@gmail.fr.

21-28: Printempa Semajna Internacia (PSI) en Wald Fischbach-Burgalben, Palatinato (Germanio). ✉ Jörg Gersonde, Hermann-

Wäsche-Str. 31, DE-06366 Köthen, Germanio. ☎ +49(0)3496558517, ✉ +49(0)1212527149641. ✉ psi@esperanto.de; www.esperanto.de/psi/.

22-28: Esperanto-lingvokurso por komencantoj/komencintoj en Francio (Plan Pesey - Savoie). Ĝi celas principe tiujn, kiuj posedas bazajn sciojn pri Esperanto kaj volas ekparoli. ☎ +3216473042 (Belgio), Sylvie Bouleau-Dufour, ☎ +33(3)80 417732 (Francio). ✉ joelleco13@hotmail.com; www.edukado.net/kursoj/19755; www.peisey-vallandry.com/.

28 mar - 05 apr: Nacia Kongreso de la Francaj Fervojistoj (FFEA) en Aspet (31160) apud Tuluzo. ✉ andmir@wanadoo.fr; http://pagesperso-orange.fr/TEF-ESPERANTO/.

29-30: Kanto-staĝoj en Grezjono kun Franjo Lévêque Provost. ✉ Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezjono, FR-49150 Baugé, Francio. ☎ +33241891034. ✉ kastelo@gresillon.org; http://gresillon.org/.

30: Renkonto por loĝaŭtoj en Francio: GPS N 44°08'12.19"/E 5°06'83.23 apud Carpentras, Francio. Kunportu manĝaĵojn kaj bonhumoron. ✉ http://pagesperso-orange.fr/max-claude/.

aprilo



04-06: 37-a Studsesio por klerigado (faka klerig-seminario) ĉe ICH/Herzberg. ✉ ICH, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. ☎ +49(0)55215983, ✉ esperanto-zentrum@web.de; www.ic-herzberg.de/.

04-06: Sabla Printempo en Písek, Ĉeĥio. Turisma, kultura kaj faka programo (daŭrigo de la seminario „Esperanto en la reto“). ✉ esperanto.pisek@seznam.cz.

11-14: Mezorianta esperantista renkontiĝo en Amano, Jordanio. ✉ araba.komisiono@esperanto.org.

14-18: Plilongigebloco (kun ekskurseblocoj, vizitoj de muzeoj, naĝejoj, saŭnejoj, uzebloco de la biblioteko kaj vidbendservo) en ICH/Herzberg, Germanio. ✉ ICH Herzberg (v. 04 apr).

14-21: 26-a Printempa Semajna Seminario de la Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj la E-rondeto en Mladá Boleslav, en Skokovy, hotelo Espero, Ĉeĥio. ✉ Drahotovaeesperanto@seznam.cz.

18-20: Jubilea Jarkunveno de dana esperantistaro okaze de la centrarigo de E-agado en Danio, en la ĉarma Kopenhago. ✉ dea@esperanto.dk; www.esperanto.dk/.

19-26: 3-aj FRINGOJ – Festa Renkonto Internacia de Geknaboj. Por geknaboj 7-17-jaraj kun siaj kursgvidantoj aŭ parencoj, en la kastelo Grezjono. ✉ Elizabet Barbay, 25 allée Gabriel Fauré, FR-93140 Bondy, Francio. ☎ +33148472387. ✉ eliz.babay@wanadoo.fr; http://gresillon.org/eventoj/fringoj/index.html.

majo

01-04: Kanto-staĝoj en Grezjono kun Franjo Lévêque Provost. ✉ Grezjono (v. 29 mar).

01-05: 9-a Meksika Esperanto-Kongreso en la urbo Aguascalientes. ✉ Meksika Esperanto-Instituto, Vicente Valdés Bejarano, direktoro. ✉ 52 449 194 4288. ✉ kongreso@webmei.org; www.webmei.org/.

01-11: 20-a Esperanto-festivalo „Aroma Jalto“, Ukrainio. ✉ p/k 35, UA-01133 Kiev-133, Ukrainio. ☎ +380-44-2851701; +380674403172. ✉ volodomir@ukr.net; www.ulej.org.ua/aj/.

01 maj - 15 okt: Someraj Esperanto-Ripozoj ĉe Nigra Maro, Bulgario. Antaŭtagmeze sunbaniĝo, naĝado en la maro. Posttagmeze ekskursoj al la famaj antikvaj maraj urboj Sozopol, Nesebar, Pomorie k. a., promenadoj sur la mara bordo; vespere Esperanto-konversacioj kaj distraĵoj en bela kaj kvieta Esperanto-hotelo. ✉ Burgas, kv. Krajmorie, str. Ĉernomorka 9, Bulgario. ☎ +359(0)56890010, ✉ 359(0)877464188. ✉ modest@abv.bg.



02-04: Staĝo pri parolata Esperanto en la lorena vilaĝo Vigy apud Metz. ☎ +33(0)382532547. ✉ esperanto-thionville@laposte.net; www.esperanto-thionville.asso.fr/.

05-09: Interkultura Semajno kun prelegoj pri interkulturaj temoj, diskutoj, muziko en la germana. ✉ ICH Herzberg (v. 18 jan).

08-12: Komuna kongreso de francaj asocioj kun la temo „Lingvoj kaj kulturoj en Mediteraneo“ en Martigues apud Marseille. ✉ mcerisay@gmail.fr; <http://esperantomartigues2008.unblog.fr/>.



09-11: Brita Kongreso de Esperanto en Southport, Merseyside. Vizitu la ĉarman britan banurbon proksiman al Liverpolo, eŭropa kultur-urbo 2008. ✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE, Britio. ☎ +44(0)1782372141. ✉ eab@esperanto-gb.org; www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/bk_payment-eo.htm.

09-12: 85-a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Temo: „Malkovru viajn antaŭjuĝojn“. ✉ Christian Darbellay, Esperanto-Kiel, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel, Germanio. ☎ +49431737788. ✉ Esperanto-Kiel@gmx.de; www.esperanto.de/geal/.

15-18: Berlina Arbara Renkontiĝo, Printempa BARo 2008 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ✉ www.krokodilo.de/baro/baro.php; DL8oap@gmx.net.

16-18: Rodanalsa Regiona Kongreso. ✉ FR-26560 Mours Saint Eusèbe, Francio. ✉ rodanalsa.federacio@yahoo.fr.



17-24: 60-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio en Poznań, Pollando. ✉ Dom Kultury „Kolejarz“, al. Niepodległości 8A, PL-61-875 Poznań, Pollando. ☎ +48-601703231, ✉ +48-61-6331595. ✉ pefa@op.pl; www.pefa.pl/.

23-25: Tutslovakia esperantista renkontiĝo en la kabano Agrikop, Snina, orienta Slovakio, kun kongreseto de SKEF, porinstruista seminario kaj ekskursoj. ✉ (v. 07 mar).

24-28: Postkongreso de la 60-a Kongreso de IFEF en Malbork, Białystok, Pollando. ✉ (v. 17 jun).

26-30: Tutmonda kongreso de esperantistoj-jurnalistoj en Vilnius, Litovio. Temo: „Internacia interkultura komunikado: jurnalismo kaj Esperanto“. ✉ Litova Esperanto-Asocio, pk 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. ☎ +37068712219,



✉ +37037228616. ✉ litova.ea@mail.lt; www.esperanto.lt/.

29 maj - 01 jun: Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo (IMER) en Krajmorie, Bulgario. Temo: „Originala Esperanto-literaturo“, lekcioj, debatoj, distraj vesperoj, ekskursoj. ✉ Georgi Mihalkov, ž. k. Nadežda V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, BG-1229 Sofia, Bulgario. ☎ (02)9344255, ✉ +359 0889137555. ✉ modest@abv.bg.

junio

06-09: 103-a Skota Kongreso de Esperanto en Invershin Hotel, Invershin, Sutherland, Skotlando. ✉ David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland IV24 3DH. ☎ +44(0)1863766061. ✉ David Hannah, dhannah559@hotmail.co.uk.



07-08: Kanto-staĝoj en Grezijono kun Franjo Lévêque Provost. ✉ Grezijono (v. 29 mar).

10-18: 30-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, Pollando, 12 km de Koszalin. Jubilea ĈEP kun riĉa kaj varia E-programo. ✉ Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando. ĈEP-organizanto: Czesław Baranowski. ☎ +48(0)503-417-825. ✉ www.esperanto.koszalin.pl/; barslavo@poczta.onet.pl.

23-27: Esperanto-kursoj en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ĉiuj kursniveloj, kursanoj el la tuta mondo. Instruisto Atilio Orellana Rojas, kursogvidanto Tiina Oittinen. ✉ Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki. ✉ eafsekretario@esperanto.fi, www.esperanto.fi.

26 jun-02 jul: FREŜO – Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Olŝtinanojn en Olŝtino (Olsztyn), Pollando. Reveno al la fama renkontiĝo kun kvizoj kun valoraj monpremioj. ✉ Marian Zdankowski, Limanowskiego 36/3, PL-10-343 Olsztyn, Pollando. ✉ avolamer@ols.vectranet.pl; Skype: [marianzdankowski](https://www.skype.com/user/marianzdankowski).

26 jun - 12 jul: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭleakta instruado de lingvo. ✉ Pavel Sittauer,

Hartmanova 1128, CZ-67401 Třebíč, Ĉeĥio. ✉ www.set-lancov.cz; podhradska@volny.cz.



30 jun - 18 jul: Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), kun Bertilo Wennergren (Svedio), Birke Dockhorn (Germanio) kaj Lee Miller (Usono), en Universitato de Kalifornio, San Diego. Riĉaj vesperaj kaj semajnfinaĵaj programoj. ✉ Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, Usono. ☎ (+1)(360)7544563. ✉ eddyellen@aol.com; <http://esperanto.org/nask>.

julio

01-10: Internaciaj aranĝoj Turismo, kulturo, historio en Carevo, hotelo Panorama ĉe la Nigra Maro en Bulgario. ✉ Ing. Boris Gaĝanov, Petar Janev 21, BG-4600 Velingrad, Bulgario. ☎ 0035935954204; ✉ 00359898676270. ✉ gadzhanov_b@abv.bg; www.elmis.hit.bg aŭ www.panorama.v-tsarevo.info.

01-10: IET-1, Internaciaj Esperanto-tagoj. Ĉemara feria kaj studa aranĝo, kunorganizata de rusiaj kaj ukrainaĵaj e-istoj. ✉ Zajdman Jefim Semjonoviĉ, ul. Kirova 26-14, UA-98600 Jalta, Ukrainio. ☎ +380964388585. ✉ jefim_z@mail.ru; Grigorjevskij.andreo@reu.ru; <http://esperanto.net/iet2008/>.

03-06: 67-a Hispana Kongreso de Esperanto en la bela kaj historia urbo Cuenca, Hispanio. ✉ alejandro.pareja@gmail.com; www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=article&id=155&Itemid=179.

05-12: 44-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-44, en Ventspils, Latvio. ✉ Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Rīga, Latvio. ☎ +37126407174 (Margarita Želve); +37167383461, +37128486628 (Bīruta Rozenfelde). ✉ margarita.zelve@gmail.com; www.esperanto.org.lv/.

05-12: Staĝo en kastelo Grezijono, 1-a grado: Steve Wagenseller, Usono; 2-a grado: Michel Dechy, Francio; 3-a grado: Serge Sire, Francio; Aktivajo: korusa kantado kun Franjo Provost. ✉ Grezijono (v. 29 mar).

07-11: Biblia Semajno en ICH Herzberg (aliĝo ĉe pastro Eichkorn). ✉ ICH Herzberg (v. 04 apr).

11-14: 56-a ELNA-Kongreso, Montrealo, Kanado. ✉ Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. ✉ www.esperanto-usa.org; elna@esperanto-usa.org.

11-14: Diversaj aktivajoj en Kulturvilaĝo en Västerås, Svedio, apud la lago Mälaren. En tendo

oni donos enkonduk-lecionojn, E-muzikistoj provludos por granda koncerto la 15-an de junio. Ludos La Perdita Generacio, Ĵomart, Nataša kaj Carina, Mehdi Martin Strid, Kaj Stridell kaj Kim Henriksen. ✉ w.posthuma@esperanto.se.

11-18: Kulturturisma semajno, UK-antaŭ-kongreso en Herzberg, la Esperanto-urbo. ✉ ICH Herzberg (v. 04 apr).

12: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuir-konkurso pri fiŝista supo, kun partopreno de esperantistoj. ✉ Székely Csaba, ☎ +36303032386 kaj +36703336111. ✉ www.bereczki-baja.sulinet.hu/esper/fishsup/; bajai@eposta.hu.

12-16: 43-a Brazilo Kongreso de Esperanto en Fortaleza, la ĉefurbo de la ŝtato Cearao, en la nordoriento de Brazilo. ✉ José Roberto Alves de Albuquerque/LKK, ✉ <http://esperanto.org.br/p/>.

12-18: Internacia Esperanto-Konferenco 2008. La temo: *Fernando de Diego – la vivo kaj verkoj*. Elektito de la OSIEK-premio okazos en Nova Gorica, Slovenio. ✉ eric@laubacher.fr; ed.borsboom@versatel.nl.

12-18: 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado. ✉ TAKE-ESK, 6358-a, rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8. ✉ www.take7.ca/; info@take7.ca.



12-19: KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) okazos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. ✉ kef9@tejo.org; <http://dejo.dk/agadejo/roskilde-festivalo/venueal-roskilde-festivalo/view>.

12-19: 3-a Internacia Konferenco de Naturkuraca Asocio en Herzberg, Germanio. Temo: „Herbokuracado en Oriento kaj Okcidento“. ✉ s-ro Harald Schicke, Schoollbrink 12, DE-27383 Hettwege, Germanio. ☎ +49(0)426394087, ✉ +49(0)426394088. ✉ MZVerlag@web.de. aŭ INA: ina-asocio@web.de.

12-19: Staĝo en kastelo Grezijono 1-a grado: Steve Wagenseller, Usono; 2-a grado: Jean-Luc Kristos, Francio; 3-a grado: Renée Triolle, Francio. Aktivajo: kantado-dancado, pied-masaĝado. ✉ Grezijono (v. 29 mar).

13-18: 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Krakovo, Pollando. ✉ Zakład Opieki Zdrowotnej, Ośrodek UMEA, Shinoda-Kuracejo, os. Albertyńskie 1-2., PL-31-851 Kraków, Pollando. ✉ umea@interia.pl; <http://umeapopka.republika.pl/>.

13-26: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov,

Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭelekta instruado de lingvo. ✉ (v. 26 jun).




19-26: 93-a Universal Kongreso de Esperanto, Roterdamo, Nederlando. ✉ (v. la kolofono). ✉ http://uea.org/kongresoj/uk_2008.html.

19-26: IJK, 39-a Internacia Infana Kongreseto en Oostvoorne apud Rotterdam, Nederlando. ✉ Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio. ✉ bertox@free.fr; <http://bertosch.free.fr/iik2008/index.html>.

19-26: Staĝo en kastelo Grezijono, 1-a grado: anoncota, vidu la retejon, 2-a grado: Jean-Luc Kristos, Francio; 3-a grado: André Cherpillod, Francio. Aktivajoj: pentrado, desegnado. ✉ Grezijono (v. 29 mar).

26 jul - 02 aŭg: Renkonto de Esperantistaj Familioj (REF) en Grezijono, Francio. ✉ Grezijono (v. 29 mar).



26 jul - 02 aŭg: IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely, Hungario. La kongresa temo estos „Minoritataj rajtoj – individuaj kaj kolektivaj“. ✉ LKK de IJK 2008, Pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. ☎/✉ +3612828885. ✉ hej@esperanto.hu (atentu pri la hungara skribmaniero de „esperanto“ ĉe la retadreso).

27 jul - 03 aŭg: KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. ✉ <http://kef.saluton.dk/>; kef9@tejo.org.

27 jul - 04 aŭg: Kristana Kongreso, 58-a Kongreso de KELI en hotelo Esperanto en Pribylina, Slovakio. ✉ Pavel Polnický, ĈEA. ✉ polnicky@quick.cz.

27 jul - 09 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭelekta instruado de lingvo. ✉ (v. 26 jun).

augusto

01-17: SOMERE – Somera mezeŭropa renkontiĝo en Kall-Krekel, Germanio. ✉ EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven,

Wicelstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎ +49306855831. ✉ somere5@esperantoland.org; www.esperantoland.org/somere/.

02-08: MIRO (Magiverda Internacia Renkontiĝo), Duga Resa, Kroatio. Tuj post kaj proksime al IJK venu amuziĝi en beleaga verda naturo. ✉ Kneza Mislava 11/IV, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ✉ kajulino@gmail.com aŭ tina.tisljar@gmail.com; www.keja.hr/.

02-09: Staĝoj en kastelo Grezijono. 1-a grado: Bertrand Gilet, Francio; 2-a grado: Gražina Opulskienė, Litovio; 3-a grado: Aurora Bute, Rumanio. Aktivajoj: teatro, pentrado sur objektoj. ✉ Grezijono (v. 29 mar).

02-10: 16-a MELA (Memzorga Lagumado) en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbaniĝi. ✉ Laca +36302097864, Andi: +36302752068. ✉ DL8oap@gmx.net; www.krokodilo.de/mela/mela.php.

02-10: 42-a Internacia Esperantista Feriado en Szczawno Zdrój, Pollando. En programo kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kaj abunda turisma programo. ✉ pomer@wp.pl aŭ vroclavo@poczta.onet.pl.

03-05: 12-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Přerov, Ĉeĥio. ✉ KAVA-PECH (v. 23 aŭg).

06-10: 3-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Ŭonbulismo en Junulara Domo Bongdo, Seulo, Koreio. Meditado-trejnado, Esperanto-kurso, Preleĝoj pri la religio. ✉ LEE Jung-kee, esperanto@saluton.net.

09-15: Somera Festivalo – Kunludo kaj kunstudu en Barlaston, Britio. 3-nivela kursaro kun la eblo turismi. ✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE, Britio. ☎ +44(0)1782372141, ✉ eab@esperanto-gb.org.

09-16: Staĝoj en kastelo Grezijono. 1-a grado: Rafael Mateos, Hispanio; 2-a grado: Sorin Porupca; Rumanio; 3-a grado: Christian Rivière, Francio; Aktivajoj: aziaj sanmetodoj, Go-Ludo. ✉ Grezijono (v. 29 mar).

10-15: Nacia Kongreso de Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj (UME) en la marborda urbo Vatamandry. Okazos ankaŭ sesio de Internacia Ekzameno, Baza Nivelo, kun relernado komence de aŭgusto en Antananarivo. ✉ Fidilalao Firaisana Henriel, lot IAH 32 Bis Avaratsena, MG-102 Ambohidrapeto, Madagaskaro. ✉ fidilalao@yahoo.fr.

16-23: Pluezekaj Renkontiĝoj en Plouezec, Francio. Antaŭtagmeze: E-kursoj, ĉiuj niveloj, posttagmeze turismo en Bretonio, ekskurso, diversaj atelieroj; vespere: distraĵoj, bretonaj dancoj, kantoj, preleĝoj ktp. ✉ Plouezec Esperanto, 5 Hent Toul Broc'h, FR-22470 Plouezec, Francio. ☎ +33(0)698495982. ✉ pluezek@gmail.com; www.babelo.org.

17: Internacia Esperanta Tablotenis-Konkurso, XX. IETKO en Hódmezővásárhely,

Hungario. ✉ KatarinaFaragó, ☎ +36303564202.
✉ farago. kata@espmad.hu.

17-24: FESTO 2008 en Lyon, Francio.
✉ louise@esperanto-jeunes.org; <http://esperanto-jeunes.org/?lang=eo>.

20-24: Boatado en Hungario. Internacia boatkaj rem-tendaro apud kaj laŭ la rivero Tisza.
✉ Vas-Szegedi Julianna, Kismuhi utca 5. III/12, HU-5350 Tiszafüred, Hungario.
☎ +36302929331. ✉ j1969@vipmail.hu.

20-24: 100-jara Jubileo de Esperanto-Movado en Lodzo kaj 31-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en urbo Lodzo, Pollando. Prelegoj, diskutoj, vizitado de urbo, arta vespero, babilado, kafumado ktp. ✉ Lodza Filio de PEA, Robert Kamiński, ✉ rk-lodzo@poczta.wp.pl.



22-28: Itala Kongreso de Esperanto kaj Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio pri la temo: „Estonto de la Ideo pri Eŭropa Identeco“ en Grosseto, Italio. ✉ grosseto2008@esperanto.it; <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>.

22-28: Infana Kongreseto en Grosseto, Italio. ✉ Leonardo Pampaloni, pampal@freemail.it; <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>; grosseto2008@esperanto.it.

23-30: EKOTUR 08: Ekoturisma renkontiĝo por piedturistoj kaj biciklantoj apud Karlštejn (proksime de Prago). Dumtagaj ekskursoj piede kaj surbicikle, tra Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy, vesperaj programoj. ✉ KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříchovice, Ĉeĥio. ☎ +420 257712201, ✉ +420 257712126. ✉ chrdle@kava-pech.cz; www.kava-pech.cz/trip-paroligo2007e-esperanto.html.

23-30: 34-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète apud Montpellier, suda Francio. Plurnivelaj kursoj, 100m de mediteranea plaĝo, ekskursoj, libroservo ktp. ✉ Esperanto Kulturo kaj Progreso, 10 impasse cole J.Ferry, FR-34290 Servian, Francio. ☎/✉ +33(0)4 67391630. ✉ jf.passarella@free.fr; <http://pagesperso-orange.fr/nikolao/esperanto.html>.



31 aŭg - 06 sep: SUS de AIS San-Marino en Banja Luka, Bosnio-Hercegovino. ✉ <http://www.ais-sanmarino.org/>; <http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/psusba/>.

septembro

04-07: Berlina Arbara Renkontiĝo, Aŭtuna BARo 2008 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln,

Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ (v. 15 maj).

14: 7-a Spiritisma Esperanta Renkontiĝo (SER). ✉ Strato Abilio dos Santos 137, BR 213310-290 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo. ✉ contato@lazarolu.izzamenhof.com.br.



19-21: XXIV. Artaj Konfrontoj en Esperanto „ARKONES“. Granda manifestacio de Esperanto-kulturo en Poznań, Pollando. Paralele kun ĝi okazos studsesio de lingvistiko en Esperanto ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz. ☎ +48509400317. ✉ www.arkones.org/; arkones@esenco.org.

21: 11-a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga (ERT) en Taguatinga Centro (Brazilo - DF, Brazilo). Temo: Esperanto en Taguatinga. ✉ www.taguatek.org.br/; tek.esperanto@ig.com.br.

26-29: Internacia Amikeca Renkontiĝo en Aylesford, Kent, Britio. ✉ Anica Page, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes MK8 9EP, Britio. ☎ +44(0)908564004. ✉ terry-page@supanet.com.

oktobro

02-05: 8-a KoKoLoRES – Semajnfina renkontiĝo por ludemuloj en Herne, Germanio. Samtempe okazos kurso por komencantoj. ✉ kokolores@esperantoland.de.

03-05: 12-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kun elekto de novaj komitatanoj de ĈEA en Přerov. ✉ jirka.tomecek@post.cz.

04-11: 16-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Salou, Katalunio (Hispanio). ✉ Luis Serrano Pérez, Apartat 423, ES-08200 Sabadell (Barcelona), Hispanio. Tel. 34 9372750 21. ✉ luis_serrano@mixmail.com; <http://personales.ya.com/semajno>.



06-12: InPaSem 2007. (Internacia Paroliga Semajno). Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Antaŭtagmeze instrueroj, posttagmeze turisma programo en Prago kaj ĉirkaŭaĵo. ✉ (v. 23 aŭg).

10-12: Jarkunveno de la Germana Fervoja Asocio GEFA en Bad Tölz, Germanio. En la programo kun Trixini. ✉ Siegfried Krüger, SLKrueger@gmx.de.

26 okt - 02 nov: 3-a Kijiva Esperanto-Semajno. ✉ p/k 35, UA-01133 Kijiv-133, Ukrainio. ☎ +38044-2851701, +3-80974403172. ✉ Volodimir Hordijenko, volodomir@ukr.net; www.kes.h.com.ua/.

novembro

(?): 1-a Amerika Festivalo de Esperanto en Havano, Kubo. ✉ KEA, Apartado 5120, CU-10500, La Habana, Kubo. ☎ +537404484, ✉ +5376498729. ✉ info@esperanto.co.cu.



07-09: KAEST 2008: Konferenco „Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ en la pensiono Sokol en Dobříchovice, Ĉeĥio. ✉ (v. 23 aŭg).

22: Kulturtago, evento de la landaj ligoj de Bremen kaj Malsupra Saksio en Bremen, Germanio. ✉ Thomas Heberlein, ✉ emas@esperanto.de.

28-30: IKF (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad Labem, Ĉeĥio. ✉ m.smycka@seznam.cz.

decembro

06-08: 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto, ligita al la omaĝ-jaro al Jaume Viladoms, elstara pedagogo, politika aktivulo kaj esperantisto. Sabadell apud Barcelono, Hispanio. ✉ www.esperanto.cat.

27 dec - 03 jan: Jubilea 25-a IF - Internacia Festivalo en Düsseldorf, Germanio. Tradicia aranĝo por familianoj kaj plenkreskuloj. Kadra temo: „Literaturo“. Tuttaga ekskurso al Aachen-Maastricht-Liège (trilanda angulo DE-NL-BE). Plilongiga eblo ĝis 4-a de januaro. ✉ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Nidenstein, Germanio. ☎/✉ +4956248007, ☎ +491714964558. ✉ IF/Platz, HDP@internacia-festivalo.de; www.internacia-festivalo.de/.




majo

20-24: Berlina Arbara Renkontiĝo, Printempa BARo 2009 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ (v. 15 maj 2007).

julio

11: Festivalo pri fiŝista supo en urbo Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuir-konkurso – kun esperantista partopreno! ✉ (v. 02 jul 2007).

25 jul - 01 aŭg: 94-A Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando. ✉ (v. la kolofono).



La nederlanda socio: malnovaj kaj novaj dividiĝoj

Du vizaĝoj de nederlanda historio

Nederlando estas historie konata pro siaj komercistoj kaj pro relative frua florado de urboj, pro la akcepto de religiaj fuĝintoj, kiel la prauloj de Spinoza. Studentoj el tuta Eŭropo pilgrimis al la universitato de Lejdeno. Ekde la 17-a jarcento Nederlando havis koloniojn sur tri kontinentoj. Sed apud tiu internacieca flanko ekzistas ankaŭ fermita, hejmlandeca sinteno de la lando. Ĝi restis neŭtrala de 1815 ĝis 1940, staris apude de la internacia politiko, kaj observis la reston de Eŭropo kvazaŭ de balkono. Ankaŭ la industriiĝo plene atingis la landon nur relative malfrue, nur post la dua mondmilito. Ĝis la 1970-aj jaroj la tri religiemaj partioj atingis pli ol la duonon de la seĝaro en la tutlanda parlamento.

La nunaj partoj de Nederlando kolektiĝis sub la Habsburga dinastio, en la 16-a jarcento. La katolikaj habsburgoj longan tempon sukcese baris la novajn kristanajn konfesiojn el la lando, kiel ekzemple la luteranisman. Tial poste la kalvinismo havis la ŝancon enpenetri Nederlandon, kaj ĝi dominis la kulturen vivon dum jarcentoj. Kalvinismo signifas ke Dio antaŭplanis ĉion, ankaŭ ke kelkaj homoj estas sukcesaj en la vivo, kaj kelkaj ne. Per la riĉeco oni do povas konstati, ke iu homo estas ŝatata de Dio kaj saviĝos. Rezulte, la kalvinistoj pene laboris kaj ŝparis sian monon.

La karikaturo nederlandano fariĝis la kalvinista pastoro, kiu moralisme kontrolas siajn najbarojn kaj protestas kontraŭ luksaĵoj, aŭ la komercisto, kiu kombinas religian bigoterion kun avido al mono.

Kvankam la kalvinistoj longan tempon konsistigis du trionojn el la nederlandanoj, ekzistis ĉiam ankaŭ katolikoj

en la lando. Preskaŭ ĉie ili estis minoritato, krom en la sudo kaj kelkaj partoj de la oriento. Dum la tempo de la Respubliko (proksimume ĝis la tempo de Napoleono) la kalvinista Nederlando regis super kelkaj katolikaj regionoj, kvazaŭ temis pri kolonioj.

La sistemo de „kolonoj“ (verzuiling)

Ekde 1813 Nederlando estis reĝolando, komence sub la absolutisme orientita reganto Vilhelmo I-a. En 1848 Vilhelmo II-a akceptis ŝanĝojn en la konstitucio, kiu donis pli da rajtoj al la parlamento, kaj ekde ĉ. 1866 la parlamenta sistemo venkis. Ekde tiam, la reĝo nomumas ĉefministron tiun politikiston, kiu havas la subtenon de la parlamenta plimulto.

Origine, en la politiko en Hago (kie kunsidas la parlamento kaj registaro) superregis kalvinistoj, holandoj, el la socia kaj geografia proksimeco de la reĝo. Tiel liberalismo fariĝis alloga por tiuj, kiuj venis el aliaj partoj de Nederlando, kiel Johann Rudolf Thorbecke el la orientnederlanda Zwolle, kiu reformis en 1848 la konstitucion. Tiu kontraŭstaro inter konservativaj kaj liberalaj fortoj troviĝis en multaj landoj, kaj poste la socialdemokratoj eniris la parlamenton. En Nederlando, la kontraŭstaroj tamen havis ofte religiajn fontojn.

Komence de la 19-a jarcento okazis skismo en la „Nederlands-Hervormde Kerk“, la nederlanda reformita eklezio. Religie severa minoritato ne plu kredis, ke la kalvinistoj povos daŭre kulture superregi. Tial la severaj kalvinistoj formu apartan grupon, la Gereformeerden, en kiu ili povu esti tiel religiemaj kiel ili volas: kun propraj asocioj, propra eduka sistemo ktp. Pastoro Abraham de Kuyper vortumis: „suverena en la propraj rondoj“. La katolikoj transprenis la ideon.

La nederlanda socio sekve disdiviĝis en kvar kolonojn, laŭ la politiksciencisto Arend Lijphart:

- ✓ Protestanta kolono: Ĝi grupigis la pli kredemajn, pli severajn el la kalvinistoj.
- ✓ Katolika kolono estis tiu de 90 elcentoj el tiuj, kiuj estis oficiale romkatolikoj.
- ✓ Socialista kolono kreskis ekde la fino de la 19-a jarcento, precipe post 1920. En ĝi troviĝis precipe malpli religiemaj kalvinistoj (kaj malmultaj katolikoj) el la laboristaro.
- ✓ Ĝenerala aŭ Neŭtrala kolono kunigis nereligiecmajn kalvinistojn, senreligiulojn kaj anojn de religiaj minoritatoj kiel la judoj. La liberaluloj estis precipe fortaj en tiu ĉi



La Pacpalaco en Hago

kolono, kiu kvazaŭ kolektas la „reston“ ne ligitan al aliaj kolonoj.

Tiu apudeco de kolonoj disvolviĝis precipe en la periodo 1920-1970. Laŭ la (ne tro troigita) stereotipo, ekzemple katoliko estis homo kiu loĝis en katolika kvartalo. Liaj infanoj frekventis katolikan lernejon, poste eble la katolikan universitaton en Nimego, li aĉetis sian panon ĉe katolika bakisto. Li voĉdonis por la katolika popolpartio, membris en la katolika sindikato, legis katolikan gazeton. Se li estis esperantisto, li aktivis en Nederlanda Katolika Esperanto-Unuiĝo. La aliaj Esperanto-asocioj en Nederlando estis Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj, Federacio de Laboristaj Esperantistoj kaj (la neŭtrala UEA-asocio) Nederlanda Esperanto-Asocio. Ili kunlaboris en komuna Federacio de Esperanto-organizoj en Nederlando (FEN). Ekde 1994 la komuna asocio nomiĝas Esperanto Nederland.

„Novaj nederlandanoj“

Se oni ne konsideras la regionajn diferencojn inter nederlandanoj, kaj precipe la frisojn, la nederlandanaro estis etne sufiĉe homogena. La plej multaj eksterlandanoj venis el apudaj landoj kiel Germanio, Belgio kaj Francio. Nederlando havis plurajn koloniojn, sed antaŭ la dua mondmilito nur malmultaj homoj venis el tie al Nederlando. Dum la Dua Mondmilito, kiam Nederlando havis naŭ milionojn da loĝantoj, la lando perdis tri kvaronojn de sia judaro.

Post la milito, Nederlando eniris novan militon, nome kontraŭ la kolonio Nederlanda Hindio, la nuntempa Indonezio (1945-1949). Pro tiu kolonia milito kaj postaj kvereloj kun Indonezio, pli ol kvaronmiliono da homoj alvenis Nederlandon: homoj iam venintaj el Nederlando, naskiĝintaj en Nederlanda Hindio aŭ havantaj unu aŭ ambaŭ gepatrojn el Nederlanda Hindio („hindaj nederlandanoj“). La plej multaj el ili bone integriĝis en la nederlandan socion, dum parto havis pli da problemoj: la molukanoj. La nederlanda registaro estis promesinta al ili aranĝi kun la indonezia registaro iaman revenon al Indonezio, kio neniam okazis. Sekve Nederlando lasis ilin longan tempon kune loĝi en centritaj lokoj, kiel la eksa nazia koncentrejo Westerbork. Kelkaj molukaj junuloj en 1975-78 prenis ostaĝojn por devigi, ke la nederlanda registaro penu pli multe pri revenigo. Nuntempe la molukanoj aŭ molukdevenuloj multe pli partoprenas la nederlandan socion.

Ĉirkaŭ la jaro 1970 venis multe da eksterlandanoj el la landoj de Mediteraneo, komence Italio kaj Hispanio, poste precipe el Maroko kaj Turkio. Ili laboris en la nederlandaj industrio kaj agrikulturo kaj reiris al siaj landoj poste. Sed multe da marokanoj kaj turkoj restis en Nederlando, pro la manko de ekonomia progreso en siaj hejmlandoj.

Pro la malalta klereco de tiuj homoj, kaj pro la komenca intenco ne integriĝi sed reiri, okazas konfliktoj inter ili kaj la nederlandanoj. Longan tempon Nederlando kredis esti la paradizo de multkultureco kaj tolerema kunvivado de diversetnaroj, sed en la 1990-aj jaroj komenciĝis debato pri la problemoj. Ĝi kulminis en la jaro 2002, kiam la populisto kaj islamkritikanto Pim Fortuyn allogis multajn voĉdonantojn. Malgraŭ lia murdiĝo, lia tute nova politika grupo en la balotoj akiris 17 procentojn el la voĉoj. Kiel ajn oni prijuĝas la tiaman kaj nuntempan debatojn, la temo certe restos en la nederlanda socio. Ekzemple en Roterdamo, 46 procentoj el la loĝantoj ne naskiĝis en Nederlando aŭ havas unu aŭ ambaŭ gepatrojn tiajn.

Senreligiigo

La tipa nederlandano, kiel dirite supre, estis iam la kalvinista pastoro aŭ komercisto. Ĝis la 1960-aj jaroj la sistemo de kolonoj ŝajnis esti ankoraŭ tre stabila. Sed pro la ekonomia progreso, kreskado de la eduka sistemo, eksteraj kaj enlandaj ideologiaj influoj, kaj eble ankaŭ la televido, nederlandanoj komencis rigardi ankaŭ ekster sian kolonon. La katolikoj povis relative bone konservi sian socian enradikiĝon – fine de la 19-a jarcento ili reprezentis 40

procentojn de la socio, nun ankoraŭ 27. Precipe la kalvinistaj eklezioj (tiam pli ol 60 procentoj) multe perdis, nuntempe nur 15 procentoj el la nederlandanoj membras ĉe ili.

Nederlando, kaj precipe Amsterdamo, gajnis la reputacion esti ekstreme liberala kaj tolerema. Tio parte estas mito, nutrata de la nederlanda emo prezenti sin kiel modelon por la resto de la mondo,

kaj nutrata de la resto de la mondo, kiu volonte kredas pri tia modelo. Tamen nedisputeble Nederlando apartenas al tiuj landoj, en kiuj tiaj evoluoj okazis tre frue. La mortpuno estis aplikata lastfoje en 1860, kun la escepto de proks. kvardek ekzekutoj lige al la Dua Mondmilito. Nederlando aplikas politikon de nepunado de droguzado ene de certaj limoj. En 2001 oni ebligis la edz(in)iĝon de gejoj kaj lesboj. Ekde 2002 ne plu estas punate, denove en certaj limoj, se kuracisto helpas al senespera paciento sinmortigi (t.n. eŭtanazio). Sed ne estas tiel ke tiaj novigoj estis enkondukitaj sen debatoj, aŭ ke tiuj debatoj ĉesis. Prikritikata estas ankaŭ la alta kvanto de nesolvitaj krimaj kazoj.

Kompare al aliaj landoj en la mondo, la problemoj de Nederlando estas bagatelaj. Prave ĝi estas multe vizitata turisma lando, pro siaj marbordoj, biciklo-vojoj, teknikaj mirakloj kaj malnovaj urboj. Indas foje atenti pri la spuroj, kiujn la historio lasis, kiel la malsameco de katolikaj kaj protestantaj eklezioj aŭ la haŭtkoloroj de la homoj.

Ziko van Dijk

(germano loĝanta en Nederlando)



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Ama hobojo. Oboe d'amore.

Amerigo Iannacone. Antaŭparolo de Giuseppe Napolitano. Gaeta: Ellegrafica, 2007. 95p. 15cm. Du-lingva eldono (E, itala). Mallongaj poemoj modernstilaj de premiita poeto. € 9,60

Biblio, La – ĉu historio? ĉu legendoj? André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2008. 189p. 21cm. ISBN 2906134767. Detruir la legendojn, tio estas la ĉefa celo de tiu ĉi libro. Ĝi estas destinita al vasta publiko. € 15,00

Ĉu vi konas Blaise Cendrars? Manuel de Seabra. Vieno: IEM, 2007. 86p. 23cm. ISBN 3010000332. Dum afrika sendependiĝa milito, koloniista soldato kaj gerilano pruntas librojn unu al la alia, riskante siajn vivojn. Libro de Blaise Cendrars fariĝas kvazaŭ simbolo de amikeco trans batallinioj. € 12,30

Dio, psiĉjo kaj mi.

Claude Piron. Vieno: IEM, 2007. 173p. 23cm. ISBN 9783010000369. Romano profunde ligita kun la profesio de la aŭtoro. Dialogaro inter psikoterapiisto kaj paciento kun neordinaraj mistikaj travivaĵoj. € 15,00

Dorso de la patrino, La. Haha no senaka. A Mother's Back. Momoko Kaji. Ilustris Narao Takao. En la anglan trad. Kenji Miyoshi. En Esperanton trad. Kiyoshi Tagahara. Tokyo: Ryu-Syobo, 2005. 80p. 19cm. ISBN 4947734981. Tri-lingva eldono (japana, Esperanto, angla); kolorilus. Fragmento el *Malproksimiĝanta Hiroshima* pri la vivo de virino kiu, kiel infano, suferis la atombombadon de Hiroŝimo. € 6,00

Esperanto – direkt. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la germanan trad. I. Žalneva. Martin: La

aŭtoro, 2008. 114p. 25cm. ISBN 9788089312047. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por germanlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperanto – den direkte metode. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la danan trad. A. Casper-Mortensen. Martin: La aŭtoro, 2007. 114p. 25cm. ISBN 9788089312030. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por danlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperanto heute. Wie aus einem Projekt eine Sprache wurde. Div. Red. Detlev Blanke. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2007. 120p. 30cm. ISSN 14323567. Germanlingva. Deko da kontribuajoj al la jara kunveno de la Asocio por Interlingvistiko, 1-3 decembro 2006. € 11,70





Esperanto kaj mi. Div. Red. kaj antaŭparolon verkis



Hori Jasuo. Maebasi-si: Horizonte, 2007. 206p. 26cm. ISBN 9784939088061. Eseo de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj. € 10,50

Fantarakontoj de l' avino, La. Le fantastorie della nonna. Lucia Barbagallo. El la itala trad. L. Tadolini. Venafro: Eva, 2007. 57p. 21cm. ISBN 9788888030951. Du-lingva eldono (E, itala). Ses tekstoj, kiuj estas nek fabloj nek fabeloj, sed io inter ili. € 10,50

Floro, La. Durante? Dante. El la itala trad. E. Dondi. Chapeco: Fonto, 2007. 242p. 20cm. Toskana ampoemaro el la 13-a jarcento. 232 sonetoj. € 16,50



➤ **Jarkolekto de TAKE 2007.** Div. aŭtoroj. Red. Bronislav Ĉupin. Wintzenheim: TAKE, 2007. 45p. 21cm. Ilus. Kvin artikoloj pri konstruadtilataj temoj. € 6,00

Kosmetiko de l' malamiko. Amélie Nothomb. Trad. el la franca. Nantes: Centre Culturel Nantes Espéranto. 98p. 19cm. ISBN 295147475X. La dua romano de la populara franca aŭtorino, kiu aperas en E-versio. € 9,90

Malhistorio. Desistória. Jorge Teles. Trad. el la portugala. Chapecó: Fonto, 2007. 237p. 22cm. Du-lingva eldono (E, portugala). Per la travivaĵoj de naŭ roluloj, ĉi tiu libro rakontas la teruran vojaĝon de la Homaro rekte al sia pasinteco. € 16,50

Poemaj dilemoj. Christian Rivière. Ilustraĵoj de Serge

Sire. Nantes: La aŭtoro, 2007. 40p. 21cm. ISBN 2951474768. Manpleno da originalaj poemoj, parte jam publikigitaj aliloke. € 3,90

Trezoro, La. Hussain M. Al-Amily. Red. G. Berveling, M. Cayley, R. Corsetti. Rotterdam: Araba Komisiono de UEA, 2008. 137p. 24cm. ISBN 9789290171010. Ilus. Kolekto de 3 000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo; kun klarigaj notoj. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

DISKO

Invito por vojaĝo.

Jacques Yvart. Donnevill: Vinilkosmo, 2008. Kun tekstobroŝuro; 51min. 15 folkecaj kantoj, ĉiuj adaptaĵoj el aliaj kantistoj (L. Cohen, J. Cash, G. Ryckeboer, G. Brassens, A. Renard, G. Moustaki). KD. € 19,80

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 26-an de aprilo 2008 (10h00 - 17h00)

- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj
- Speciala temo: UEA 100-JARA
- ★ Bazaro de e-aĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Libroservo de UEA en 2007: La sesa ĉampioneco de Boris Kolker

Per Vojaĝo en Esperanto-lando akademiano Boris Kolker fariĝis ĉampiono de la Esperanta libromarkato ankaŭ en la jaro 2007. Lia perfektiga kurso, kiu samtempe estas enkonduko en la Esperanto-kulturon, gajnis la unuan lokon jam en la sesa sinsekva jaro, kio ne sukcesis al alia libro dum tiuj pli ol 30 jaroj, dum kiuj la Libroservo de UEA aperigis furorlistojn de siaj vendoj. Ekde 2002 vendiĝis 2568 ekz. de la libro de Kolker; el ili 295 pasintjare.

Ĉi-apude aperas du listoj. Tiun de totalaj vendoj influas kvantaj mendoj de aliaj libroservoj. La alia listo dokumentas unuekzemplerajn vendojn al individuaj klientoj poŝte aŭ surloke en Roterdamo. En la listo de ĉiuj vendoj estas 11 eldonaĵoj de UEA/TEJO; en tiu de unuopaj vendoj ili estas 8 el 20. La vendoj en la kongresa libroservo estas enkalkulitaj en la statistiko de ĉiuj vendoj. Aparta furorlisto de la Jokohama UK aperis en la decembra numero (p.251).

La adresaro de *Pasporta Servo*, tradicia rivalo de Kolker, vendiĝis en 276 ekzempleroj. La reeldono de *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat en redakto de Ulrich Lins, kvankam aĉetebla

nur ekde aŭgusto, atingis la trian lokon (245). Ĝin sekvas *Lingvo kaj popolo* de Humphrey Tonkin (232), kiu siavice staras ĉe la pinto de unuopaj vendoj (44). Tre sukcesan lanĉon spertis la lernolibro de Stano Marček, *Esperanto per rekta metodo* (179). Ĝi aperis ankaŭ en multaj aliaj lingvoj, el kiuj la japana eldono, evidente dank' al la vendado en la UK, sukcesis eniri la liston de totalaj vendoj.

Ĉar diskoj kutime ne atingas furorlistojn, estas notinde, ke la abund-enhava *Esperanto elektronike* eniris la „grandan liston” por la dua fojo kun 111 vendoj. Ĝojiga estas ankaŭ la sukceso de la unua volumo de *Beletra Almanako*, kiu aperis sur la merkato fine de septembro sed malgraŭ malmulta tempo atingis la kvaran lokon ĉe unuopaj vendoj (34 ekz.).

La vendoj sumiĝis je 121 172 eŭroj. Kompare kun la bona jaro 2006 okazis malkresko de 12 747 eŭroj pro la tradicie malpli bona debito de la kongresa libroservo, kiam UK okazas ekster Eŭropo. Hazarde la vendosumo preskaŭ precize egalas tiun en 2004, kiam la antaŭan fojon la UK okazis en Azio kaj la vendoj sumiĝis je 121 374 eŭroj. La Libroservo de UEA vendis entute 2 214 diversajn titolojn. Nur de 84 el ili estis venditaj pli ol 10 ekzempleroj kaj 1080 vendiĝis nur 1-ekzemplere. 3306 titoloj allogis dum la jaro neniun klienton.

Osmo Buller

DONACOJ

Ĝis la fino de 2007

Konto Afriko: Aŭstralio: F. A. Badu 60,00. Hispanio: L. E. Hernández 100,00; R. Urueña 200,00. Nederlando: C. & R. Bossong 25,00. Svedio: J. Hammarberg 53,51; L. Nordenstorm 212,09. *Sumo en 2007: 3 010,34.*

Fondaĵo Ameriko: Svedio: J. Hammarberg 10,63. Usono: A. Bennett 34,57; R. Glossop 6,91; J. G. Johnson 6,90; C. Warrington 0,69. *Sumo en 2007: 1938,11.*

Fondaĵo Azio: Koreio: Korea E-Asocio 410,00. Japanio: K. Kuriki, K. Sasanuma, I. Sunagawa, K. Tanaka, M. Yasumura, S. Yosikawa – po 12,12. *Sumo en 2007: 2 233,93.*

Konto Novjorka Oficejo: Hispanio: L. E. Hernández 100,00; R. Urueña 150,00. Usono: R. Glossop 6,91; J.G. Johnson 6,90; E. Sorenson 13,79; C. Warrington 1,38. *Sumo en 2007: 370,79.*

Fondaĵo Canuto: Nederlando: A. & H. Bakker 500,00; R. Moerbeek 25,00. Nov-Zelando: D. Dewar 51,76. Svedio: L. Nordenstorm 107,66. *Sumo en 2007: 6 238,90.*

Fondaĵo Espero: Luksemburgio: I. Ertl 30,00. Nederlando: A. & H. Bakker 908,00; R. Haveman 10,00. *Sumo en 2007: 978,00.*

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Kanado: B. R. Crisp 10,00. Nederlando: A. & H. Bakker 500,00. Nov-Zelando: A. Jansen 45,03. *Sumo en 2007: 2 674,30.*

Volontula Fondaĵo:

Nederlando: A. M. Peeraer 20,00. *Sumo en 2007: 1 146,02.*

Domrenovigo: Hispanio: L. E. Hernández 150,00; R. Urueña 100,00. Francio: L. & J. Marin (biblioteko) 2 000,00. Nederlando: A. & H. Bakker 1 000,00; A. Nonima (biblioteko) 127,00. *Sumo en 2007: 17 943,60.*

Ĝenerala kaso: Britio: A. Prent 15,83. Hispanio: A. Nonima 100,00. Usono: P. Cook, E. Richards, E. Sorenson, J. D. Wiseman – po 17,24; R. Glossop 6,92; J. S. Gorny 47,59; D. C. Halley 68,97; M. Milton 41,38; R. Skutt 10,20; C. Warrington 1,38; J. Wright 13,61. *Sumo en 2007: 4 783,56.*

Al ĉiuj koran dankon! UEA

VENDOJ ENTUTE

ekz. titolo	prezo (€)
295 <i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> , B. Kolker*	18,00
276 <i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj*	15,00
245 <i>Vivo de Zamenhof</i> , E. Privat*	9,00
232 <i>Lingvo kaj popolo</i> , H. Tonkin*	14,10
179 <i>Esperanto per rekta metodo</i> , S. Marček	8,10
138 <i>Afero de espero</i> , H. Goes*	9,00
137 <i>Saluton!</i> , A. Childs-Mee*	10,80
113 <i>Internacia Kongresa Universitato 2007</i> , red. A. Wandel*	12,00
111 <i>Esperanto elektronike</i> , komputila DVD	9,00
109 <i>Gerda malaperis!</i> , C. Piron	5,70
99 <i>La Komuna Eŭropa Referenckadro</i> , Div.*	3,00
99 <i>Vikipedio – praktika manlibro</i> , Red. Y. Nevelsteen	3,00
90 <i>Historio por malfermi estontecon</i> , Div.	15,00
89 <i>Pocket Esperanto Dictionary</i> , A. McLinen*	15,00
84 <i>Mil unuaj vortoj en Esperanto</i> , H. Amery	12,00
74 <i>Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumon</i> , S. Marček	7,50
73 <i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> , B. Wennergren	27,00
72 <i>Japanio kalejdoskope</i> , Div.	5,40
66 <i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton*	13,80
55 <i>Konciza etimologia vortaro</i> , A. Cherpillod*	21,60

VENDOJ UNUOPAJ

ekz. titolo	prezo (€)
44 <i>Lingvo kaj popolo</i> , H. Tonkin*	14,10
43 <i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj*	15,00
40 <i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> , B. Wennergren	27,00
34 <i>Beletra Almanako 1</i> , Div.	10,50
33 <i>Vivo de Zamenhof</i> , E. Privat*	9,00
27 <i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005</i>	87,00
27 <i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> , B. Kolker*	18,00
26 <i>Esperanto per rekta metodo</i> , S. Marček	8,10
25 <i>Konciza etimologia vortaro</i> , A. Cherpillod*	21,60
25 <i>Afero de espero</i> , H. Goes*	9,00
24 <i>Informado praktike</i> , Z. van Dijk	15,00
22 <i>Biblio</i>	20,10
20 <i>Esperanto elektronike</i> , komputila DVD	9,00
20 <i>Vikipedio – praktika manlibro</i> , Red. Y. Nevelsteen	3,00
19 <i>Historio de Esperanto</i> , A. Korjenkov	12,00
19 <i>Relativeco per bildoj</i> , W. Atkinson	9,30
19 <i>La Komuna Eŭropa Referenckadro</i> , Div.*	3,00
17 <i>La bona lingvo</i> , C. Piron	13,50
17 <i>2 paroladoj de Ivo Lapenna</i> , vol. V, KD	13,50
17 <i>Esperanto kaj lingva diverseco</i> , Hagège & Lo Jacomo*	2,70

* Eldonaĵoj de UEA/TEJO

En la brazila savano: Bona Espero por infanoj

En la Esperanta gazetaro de tempo al tempo legeblas informoj pri la bieno-lernejo „Bona Espero“ (BE) en Brazilo, sed certe ne malutilus foje ripeti kelkajn.

Kiel konate en 1957 brazilaj esperantistoj fondis BE kiel socialan institucion por infanoj, kiu ekde 1974 estas ĉefe animata de la internacia paro Ursula (el Berlino) kaj Giuseppe (el Torino) Grattapaglia. Antaŭ nur kelkaj monatoj, nome la 1-an de junio 2007, la bieno-lernejo festis sian 50-jaran jubileon. La eventon partoprenis pli ol 200 personoj, inter ili fondintoj, amikoj, ekslernantoj, oficialuloj. Fariĝis tute klare, ke aparte dum la lastaj jardekoj BE evoluis al moderna lernejo-internulejo.

Ankaŭ ni volis finfine konatiĝi kun tiu fenomeno, unika en la historio de Esperanto, kun ofte ne facila vivo. La bieno troviĝas sur la centra altebenaĵo de Brazilo (1 200 m), meze de la sovaĝa savano, najbare al la pli kaj pli frekventata „Parque Nacional da Chapada dos Veadeiros“, 240 km norde de la brazila ĉefurbo. Ni estis en BE de 24.12.2007 ĝis 20.1.2008.

Samtempe kun ni tie restadis la franca volontulo Jonatano el Bretonio kaj la konata pola televida ĵurnalisto kaj libro-aŭtoro Roman Dobrzyński kun sia germana edzino Erika. Roman per dek vizitoj kaj ampleksa studado en arkivoj enprofundiĝis en la historion kaj nunon de BE kaj produktis kelkajn filmojn (i.a. *Bona Espero* [1984], *Ludovikoj en Brazilo* [2000], *Unu tago en la paradizo* [2003]). Li estas ĝuste nun finverkanta dokumentan libron, pri kies foje spirhaltiga enhavo ni jam povis informiĝi.

Pleje nin impresis la infanoj, vere belaj, de nigraj ĝis brunaj, ridemaj kaj ludemaj, malfermaj kaj kontaktemaj. Ĉeestis nur relative malmultaj, ĉar ĝuste nun okazis la brazilsomeraj ferioj.



Vidante kaj regule kontaktante tiujn infanojn, oni ne povas supozi, ke ili venas el foje malfacilegaj cirkonstancoj. BE donas al ili vere „bonan esperon“, peras al ili novan feliĉigan vivosenton, kiun ili antaŭe ne povis sperti, evitigas al ili la sorton de „stratinfanoj“ sen perspektivo, malsatantaj kaj ofte krimemaj, kiuj en Brazilo ankoraŭ abundas.

BE funkciadas laŭ la koncepto de „granda familio“. Ĉiu transprenas taskojn laŭnecese kaj laŭpove. Ankaŭ infanoj kompreneble helpas kaj lernas transpreni malgrandajn devojn. Regis vere bona etoso.

Kvalifikitaj instruistinoj kiel Adarci Ferreira de Sousa (Ada) kaj Maria Odeta, kiuj mem edukiĝis en BE, zorgas pri alfabetigo kaj transdono de bazaj scioj al la infanoj (ĝis la nivelo de la 4-a klaso) por ebligi al ili plukleriĝon en la proksima urbeto Alto Paraíso aŭ aliloke, foje eĉ ĝis abiturienta ekzameno en Braziljo.

Ni fojfoje povis konatiĝi kun rezultoj de la sindediĉa laboro de la stabo de BE. En Alto Paraíso kaj en la ĉefurbo Braziljo ni ekzemple renkontis plenkreskulojn, kiuj apartenis al la pli ol 400 infanoj, kiuj edukiĝis en BE kaj sukcesis kleriĝi, havi profesion kaj fondi familion. Ni rimarkis, ke Ursula kaj Giuseppe tie estas alte estimata „kvazaŭinstitucio“. Multloke oni rimarkis eĥojn kaj aprezon de ilia laboro.

La ŝtato nur malmulte subvencias, sed lastatempe almenaŭ certigas la elektran kurenton. La ĉefa subteno venas de multaj esperantistoj el la mondo. Ekzemple en Germanio antaŭ jaroj fondiĝis subtena asocio, kiu kolektas monon. Brazilaj esperantistoj helpas diversmaniere.

Apartan rolon ludas la bonfara internacia Rotaria Klubo, kie Ursula kaj Giuseppe efike agadas per kaj por Esperanto. Ne nur BE foje ricevis subtenon de la sama klubo, sed ankaŭ la urbo Alto Paraíso. Aktuale oni ekz. klopodas pri subvencio por kardiologia instalaĵo, kiu ĝis nun mankas en la urba hospitalo.

BE funkcias dulingve: ĉiutage uzatas la portugala kaj Esperanto. La internacia lingvo tute nature ludas la rolon de interkomprenilo inter „bonesperanoj“ kaj eksterlandaj gastoj kaj volontuloj, kiuj dum jardekoj alvenadas por helpi al BE aŭ konatiĝi kun ĝi. Ne malofte ili instruas Esperanton al la ege viglaj infanoj aŭ alimaniere aktivigas ilin. Simile faris Roman (per la Mazi-kurso) kaj ankaŭ ni.

Kvankam tute evidente BE ne estas esperantista propagando-entrepreno, per sia konkreta humanisma kaj eduka laboro en Brazilo ĝi foje atingis pli por altigi la prestiĝon de la lingvo, ol tio kutime eblas al tipa esperantista organizaĵo. Aparte surprizegis nin la privata televida stacio „TV Supren“ en Braziljo, gvidata de tre konata advokato kaj bonfarulo Ulisses Riedel, la Ĝenerala Direktoro de BE. En la programkajero de la stacio por decembro 2007 ni trovis pli ol 30 programerojn en Esperanto (kun portugala subtitolo) aŭ pri la Internacia Lingvo. La Esperanto-programon prizorgas Paulo Nascentes. Li „laborigis“ ankaŭ nin per ampleksaj intervjuoj.

Finfine substrekendas, ke Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia ne nur donis kaj daŭre donadas sian vivo-tempon kaj energion, ili ankaŭ investis en BE grandan parton de siaj privataj rimedoj. Sed tute aparte ili donas sian entuziasmon, amon, zorgemon, multflankan kleron kaj ŝajne senliman laborforton. Ni esperas, ke baldaŭ aperos same sindediĉa paro el nova generacio por transpreni la torĉon...

Wera kaj Detlev Blanke



Fotoj: Elio Miranda

KEA kaj UEA: Jubilea Simpozio en Havano

La centjara jubileo de UEA estas sendube unika okazo por celebri, festi kaj ankaŭ omaĝi la pionirojn de nia pli ol centjara esperantista movado. Tamen, por kubaj esperantistoj tiu unikaĵo ĉi-foje multobliĝis kun la certeco, ke elstara gasto vizitos Havanon.

La ĝenerala direktoro de UEA, s-ro Osmo Buller, alvenis al Havano la 2-an de februaro invitate de Kuba Esperanto-Asocio kaj per subteno de diversaj landaj institucioj, kiel parto de esplora tasko kiu markas historian starpunkton por la kuba esperantistaro.

Tiu ĉi evento instigis kaj mobilizis la estraron de KEA organizi kultur-klerigan solenaĵon omaĝe al la centjariĝo de nia organizaĵo, nome la Simpozio „Centjara Jubileo de UEA“.

La Simpozio okazis la 7-an de februaro en la teatro de la Nacia Biblioteko de Havano kaj ĝin partoprenis proksimume cent geesperantistoj ne nur el Havano sed ankaŭ el aliaj tri provincoj de la centra parto de la lando, kiuj devis veturi eĉ pli ol 200 kilometrojn.

Nome de la kuba esperantistaro, la prezidanto de KEA, s-ro Julian Hernández, esprimis la honoron ĝuati de la kuba esperantistaro pro tiom elstara vizito donanta la okazon efektiviĝi solenaĵon omaĝe al UEA, kiun li taksis „necesa kaj plifortigenda per komuna laboro de la esperantistaro“.

Alia elstara gasto de la simpozio estis la eminenta ambasadoro de la Araba Respubliko de Egiptio, s-ro Abdel Fattah Ezzeldin, kiu prelegis pri siaj spertoj kaj revoj pri daŭra kresko de la movado internacie. Li aparte emfazis, ke ne estante „finvenkisto, li certas ke Esperanto venkis kaj venkos daŭre en sia celo ebligi komunikadon interhoman“.

Kiel parton de la programo, oni ĝuis prelegon de KEA-estraro kaj historiisto Juan Ramón Rodríguez pri la rilatoj inter KEA kaj UEA laŭlonge de cent jaroj de la monda organizaĵo. Prelego de Maritza Gutiérrez González, kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA, temis pri UEA, la fondo kaj kelkaj eroj el ĝia historio.

Kultura momento estis prezentita de aktorino-esperantistino Yoandra Isabel Rodríguez, kiu deklamis la poemon *La sufero de l' aliaj* de Claude Piron, kiel solenan omaĝon

de la kuba esperantistaro al la ĵus forpasinta verkisto, poeto kaj psikologo. La elstara aktorino Georgina Almanza fermis la kulturan momenton per deklamado de la poemoj *Kredo* de la portugallingvano Aquiles Nazoa kaj *La vojo* de L.L. Zamenhof.

La festparoladon faris la ĝenerala direktoro, s-ro Osmo Buller, kiu taksis la eventon „verŝajne la unua jubilea ceremonio okaze de la centjariĝo de UEA“ kaj certigis, ke ĉi-jare, kiam oni celebras tiun okazon, „ni ĉiuj sentas grandan dankegon al tiuj generacioj de esperantistoj, kiuj portis la flagon de UEA en tre malfacilaj cirkonstancoj, lasante al ni grandan heredaĵon kaj defion por konkretigi la laboron, kiun ili komencis“. Li aldonis, ke „komplete per la agado de esperantistoj mem jam cent jarojn vivas UEA, pri kio ja ni ĉiuj rajtas fieri“.

Sendube la Simpozio de KEA omaĝe al la centjara jubileo de UEA konsistigis historian kaj emocian eventon, aparte signitan per la ĉeesto de la ĝenerala direktoro de UEA, kaj rolis kiel entuziasma kaj reala konfirmo de la kuba esperantistaro inviti la internacian Esperanto-movadon kongresi en Havano en la jaro 2010.

Maritza Gutiérrez González



Buller esploris pri UK en Kubo

Okaze de sia vizito en Kubo Osmo Buller esploris la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en la jaro 2010. Kun subteno de ŝtataj, urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj KEA invitas la esperantistan mondrenkontiĝon al Kubo jam por la dua fojo.

Buller renkontis funkciulojn de diversaj instancoj, kies sinteno al la okazigo de UK en Kubo estas tre entuziasma. Li estis akceptita i.a. de s-ro Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, kaj s-ro Conrado Martínez, prezidanto de la Kuba Kongresa Buroo kaj antaŭe urbestro de Havano. Surpriza kaj agrabla estis la konatiĝo kun s-ro Abdel Fattah Ezzeldin, ambasadoro de Egiptio, kiu lernis Esperanton en 1982 en Budapeŝto. Li invitis Buller kun reprezentantoj de KEA al sia rezidejo por vespermanĝo, kiun ĉeestis ankaŭ la ambasadoroj de Jamajko, Kamboĝo kaj Pollando, honora konsulo de Finnlando, direktoro de la oficejo de Unesko por la Kariba regiono, kaj funkciuloj de la Nacia Unesko-Komisiono de Kubo. Dum la vespero la ambasadoro pruviĝis lerta pledanto por Esperanto, kiu kun siaj Esperanto-kolegoj kompetente respondis al plej diversaj demandoj de la ne-esperantistaj gastoj.

Esperanto en la Unesko-retejo

Danke al la nova atento de UEA al la agado de Unesko kaj la aktiveco de UEA por diskonigi la Internacian Jaron de Lingvoj, celebratan ĉi-jare, Unesko afiŝis en sia retejo ankaŭ Esperantan tradukon de la deklaro de la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Koïchiro Matsuura, pri tiu speciala jaro de UN kaj Unesko. En multaj landoj aktivuloj de UEA ludis rolon por atentigi la naciajn komisionojn de Unesko kaj aliajn oficialajn instancojn pri la Jaro, kaj komunaj aktivaĵoj estas planataj. Esperantistoj ankaŭ laboris por traduki la deklaron de Matsuura al diversaj lingvoj. La deklaro de Matsuura en Esperanto k.a. lingvoj troviĝas ĉe: http://portal.unesco.org/culture/en/ev.php-URL_ID=36000&URL_DO=DO_TOPIC&URL_SECTION=201.html.

Ĉirkaŭ 1200 aliĝis al Roterdamo

Ĝis la 13-a de februaro 1195 Esperantistoj el 59 landoj estis registritaj kiel aliĝintoj al la 93-a UK en Roterdamo (19-26 julio 2008).

Trideko da aliĝiloj ankoraŭ atendis solviĝon de bankaj komplikaj. Kun 155 aliĝoj Francio transprenis de la gastigonta



Ni proponas senpagan

Biblian Studkurson

Kursanoj senpage ricevos
Esperantan Biblion
*"... kaj ili forĝos el siaj
glavoj plugilojn, kaj el siaj
lancoj rikoltojn; ne levos nacio
glavon kontraŭ nacion, kaj
oni ne plu lernos militon."*
Jesaja 2:4

www.biblio-misio.org

Internacia Biblio Misio
50 Wissage Road,
LICHFIELD
WS13 6SW Anglio

lando Nederlando la unuan lokon. Ankaŭ Germanio, kun 133 aliĝintoj, preterpasis Nederlandon, kiu ĝis nun liveris 123 kongresanojn. Kun pli ol 20 aliĝintoj reprezentigas Japanio (85), Belgio (62), Italio (47), Litovio, Pollando kaj Rusio (po 42), Britio (33), Danlando kaj Finnlando (po 32), Hispanio, Irano kaj Svedio (po 23) kaj Svislando (21).

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- ◆ bela marborda situo, en mondfama universitato
- ◆ trisemajna intensa lernado de Esperanto
- ◆ tri niveloj: postbaza, meza, supera
- ◆ internaciaj instruistaro kaj studentaro
- ◆ riĉaj vesperaj kaj semajnfinaj programoj

Datoj: 30 junio - 18 julio 2008.

Loko: Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD).

Instruistoj: Bertilo Wennergren (Svedio), Birke Dockhorn (Germanio) kaj Lee Miller (Usono).

Direktoro: Grant Goodall.

Speciala kotizo por studentoj kaj instruistoj! Rabatita kotizo por ĉiuj ĝis 20 marto 2008! Stipendioj haveblas.

Trovu pli da informoj en <http://esperanto.org/nask>, aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 USONO. ☎ (+1) (360) 754-4563; ✉ eddyellen@aol.com.

NASK okazos dua-foje en sud-Kalifornio. La instruistoj pretigas trinivelan studprogramon kiu emfazos la aktivan uzadon de Esperanto kaj enprofundiĝon en la Esperantan kulturon.

Oni povas perfektigi sian Esperanton kaj uzi ĝin tuj ĉe la UK 2008.



RABATITAJ VIDBENDOJ!



Komence de la jaro ni draste rabatis la prezon de ĉiuj son- kaj vidbendoj. Ĉi-sube vi trovas liston de ĉiuj vidbendoj ankoraŭ haveblaj pere de la Libroservo de UEA. La ĉi-subaj informoj validas je la 10-a de februaro 2008. Por pliaj detaloj, bonvolu viziti nian retan katalogon: <http://katalogo.uea.org/>.

Al la indikitaj prezoj aldoniĝas sendokostoj (10%; min. 4 EUR) kaj, por EU-loĝantoj, 19% por la aldonvalora imposto. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj de la sama titolo, sendotaj samtempe al la sama adreso.

- AL SUD-AŬSTRALIO; IO NEORDINARA.** M.E. Furness. 44min. PAL. 1996. €9,90.
- ALPOJ SVISAJ, LA.** Realigita de Francisko Randin. 30min. NTSC. 1997. €9,90.
- BALONFESTO.** Kevin kaj Malcolm Jones. 20min. PAL. 2002. €9,90.
- CHOPIN REVENAS AL MAJORKO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 20min. PAL. 2002. €9,90.
- EN EŬROPO IE.** 80min. PAL. 1987. €9,90.
- ESPERANTO BUNTE VIVAS.** 28min. PAL. 1999. €9,90.
- ESPERANTO EN LA BRAZILA ALTEBENAJO.** Planis, filmis kaj reĝisoris Ciro Gomes de Freitas. 34min. NTSC/PAL. 1996. €9,90.
- FONTANOJ DE ROMO.** 72min. PAL. 1995. €9,90.
- GOTAS DE ESPERANTO.** Sylla Chaves. 6 unuhoraj vidbendoj. NTSC. 2002. €59,40.
- GRAVECO DE LA FIDELIĜO, LA.** Reĝ. Lou Brooks. 145min. PAL. 1987. €9,90.
- INTERVJUO DE ANDREJ KOROBĚJNIKOV.** Intervjuis J.-Th. von Buerren. PAL. 2003. €9,90.
- ISRAĚLO 5753.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 23min. PAL. 1994. €9,90.
- KIAM PARIZO ESTIS PARIZO ANKAŬ POR NI ESPERANTISTOJ...** Kantas Nicole Pairoux. 29min. PAL. 1989. €9,90.
- KINARTO KAJ NI.** Red. Giorgio Silfer k.a. 40min. PAL. 1990. €9,90.
- KOMPRESI KANGURUON.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 62min. PAL. 1998. €9,90.
- KRISTNASKO EN SALVADORO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 22min. PAL. 1994. €9,90.
- KVIN KOLOROJ DE KOREJO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 30min. NTSC/PAL. 1994. €9,90.
- LAŬZANA POLICO PREZENTAS SIN, LA.** Reĝ. Francisko Randin. 30min. NTSC/PAL. 1995. €9,90.
- LEKANTO AL PEKINO.** Francisko Randin. 60min. PAL. 2004. €9,90.
- LETERO EL UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, LA.** PAL. 1996. €9,90.
- LUDOVIKOJ EN BRAZILO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 24min. PAL. 2002. €9,90.
- MALTO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 30min. PAL. 1994. €9,90.
- MEFISTO.** 140min. PAL. 1988. €9,90.
- MUZIKSKATOLOJ, LA.** Francisko Randin. 30min. PAL, SECAM. 1998. €9,90.
- PLURSPECAJ EROJ POR ARTAJ VESPEROJ.** Sylla Chaves. 57min. NTSC, PAL. 2002. €9,90.
- PROF. REINHARD SELTEN INTERVJUATA DE RAINER KURZ.** 55min. PAL. 2003. €9,90.
- REVENO AL FINNLANDO, LA.** O. Buller, R. Dobrzyński, J. Heikkinen. 25min. PAL. 1991. €9,90.
- ROKO DE LIBEREKO, LA.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 20min. PAL. 2003. €9,90.
- SONORIDADE DO ESPERANTO, A.** Sylla Chaves. 55min. NTSC, PAL. 2002. €9,90.
- SPUROJ DE LA AVO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 30min. NTSC, PAL. 1994. €9,90.
- SUR LA PONT DE AVINJON.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 17min. PAL. 2002. €9,90.
- TERO EL MARO.** Reĝ. Ósvالدur Knudsen. 20min. PAL. 1993. €9,90.
- venu RAPIDE HOMOJ.** 120min. PAL. 1998. €9,90.
- VIENA RINGO.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 20min. PAL. 1992. €9,90.
- VIZITO DE LA IMPERIESTRO, LA.** Reĝ. R. Dobrzyński. 80min. PAL. 1993. €9,90.
- ZAMENHOF EN ZAGÓRNIK.** Reĝ. Roman Dobrzyński. 20min. PAL. 1996. €9,90.



EL LA JUBILEA KOLEKTO



Esperanta antologio. Poemoj 1887-1981. Red. William Auld. Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto; kun postparolo de W. Auld kaj 36 paĝoj da biografiaj notoj. Ilus. Bind. Kromkovrilo. Jubilea Kolekto n-ro 1. 12+888p. 22cm. Rotterdam: UEA, 1984 (2-a eld.). €12,30.

Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj. Gaston Waringhien. Eleganta studaro pri la fontoj kaj strukturo de Esperanto: unu el la ĉefverkoj de la esperantologio. Bind. Kromkovrilo. Jubilea Kolekto n-ro 3. 452p. 21cm. Rotterdam: UEA, 1989 (2-a reviziita eld. kun Apendico). €12,30.


Nova Esperanta krestomatio. Red. William Auld. Vasta panoramo de tekstoj el la tuta historio de Esperanto, inkluzive de rakontoj, elstaraj tradukoj, sciencaj kaj prilingvaj eseoj, poemoj pri Esperanto, kaj poezia antologio el 73 lingvoj. Bind. Kromkovrilo. Jubilea Kolekto n-ro 5. 510p. 21cm. Rotterdam: UEA, 1991. €12,30.

Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto. L.L. Zamenhof. Notoj kaj antaŭparolo de G. Waringhien. La senŝanĝan Zamenhofan tekston kompletigas abundaj notoj pri la nuntempa lingvouzo. Bind. Kromkovrilo. Jubilea Kolekto n-ro 6. 18+446p. 21cm. Rotterdam: UEA, 1992 (18-a eld.). €12,30.



La Fenomeno Esperanto. William Auld. Studo pri la lingvoproblemo kaj pri la internacia lingvo. Celita por traduko en naciajn lingvojn. 120p. 21cm. Rotterdam: UEA, 1998. €7,20.

Esperanto: lingvo, literaturo, movado. Pierre Janton. Scienca kaj tamen populare verkita superrigardo, bazita sur klarvida rigardo al la ĝisnuna evoluo kaj uzo de la lingvo. 120p. 21cm. Rotterdam: UEA, 1998. €7,20.



Ĉe la Libroservo de UEA triona rabato por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de la sama titolo.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Venigu afrikanojn al UK!

Partopreno en UK estas granda revo por afrikaj esperantistoj. Al Jokohamo pasintjare ili ne povis veni pro altaj veturkostoj, sed Roterdamo situas pli proksime.

Ebligu per via mondonac(et)o, ke afrikanoj povu partopreni kaj sperti la UK-etoson, kaj ke aliaj kongresanoj havu kontakton kun la afrika movado!

Sendu vian kontribuon al UEA kun la indiko "Afrikanoj al UK".